# LIBERA LABORISTO

Oficiala organo de Tutmonda Ligo de Esperantistaj Senŝtatanoj. <TLES>






Redaktejo: J. M. Esperanto
9, rue Louis Blanc, Paris X

Administrejo: Artur Bolle
Tresckowstr. 58, Berlin N 58

1a Jaro | Aŭgusto 1925 | No. 1


## Kiuj ni estas kaj kion ni volas.

Esperanto jam delonge penetris laboristan medion kaj servas al ĝi kiel universala interligilo en diversaj sferoj de la tutmonda laborista movado. Jam preskaŭ antaŭ 20 jaroj komenciĝis tiu procedo de esperanto-aplikado kaj utiligo por revoluciaj kaj laboristaj interesoj. Niaj kamaradoj liberecanoj-esperantistoj ĉiam estis en la unuaj vicoj de la pioniroj en tiu movado. Sufiĉas memorigi, ke jam la unua socia revuo en esp.e "Internacia Socia Revuo" (1906) estis iniciatita kaj eldonata kun helpo de liberecanoj. Tre aktivan rolon ludis ankaŭ niaj samcelanoj en la postmilita periodo, dum la reviglîĝo kaj renaskiĝo de laborist-esp.ista movado, partoprenante en la iniciato kaj kreo de la plej fortaj laborist-esp.istaj organizaĵoj.

Dum la lastaj jaroj espa-laborista movado tiom kreskis ke ĝi jam komencis diferenciĝi, fakiĝi, dividiĝi laŭ partiaj kaj politikaj tendencoj. En tia momento, ni liberecanoj, ne havantaj ĝis nun propran specialan tribunon por nia idearo, ĉiam pli kaj pli enfalas en strangan kaj netolereblan staton de la homoj, sidantaj en fremda hejmo kaj verŝantaj akvon por fremda muelejo. Laborante dise kaj neorganizite en la ĝenerala laborist-esp.ista movado ni ĉiam pli ofte helpas al fremdaj por ni politiktendencoj sin organizi kaj formiĝi en certan tutaĵon kaj ni mem restas same malfortaj kaj amorfaj.

La laboro de la lasta periodo kaj la sperto, kiun ni akiras en ĝi, montras al ni, ke plu ni atendi ne povas, ĉar ni jam fariĝas ridindaj malŝparegante nian energion por alies utilo.

Jen kial ni tuj post la fondo de T. L. E. S. elpaŝas kun nia propra organo "Libera Laboristo". Paroli duonvoĉe! Balbuti sur "gastamaj" paĝoj de alitendencaj revuoj kaj auskulti admonojn kaj edifajn notojn de la redaktoroj ni ne plu volas! Ni parolu plenvoĉe, laute, sencenzure pri niaj propraj aferoj. Ni servu al nia idealo kaj iru al ĝi per propra vojo. Kiaj do estas

*niaj celoj, planoj kaj labormetodoj?*

Nia ĉefa celo estas: ne vorte, sed *fakte servi al liberecana movado*. Ne eĉ unu artikolo pri esp.o au esp.a movado! Nur mallonge ni pritraktos nian propran organizan-esp.an laboron en liberecanaj rondoj kaj analogian laboron de aliaj proletaj organizaĵoj. Ĉi-servon plenumos rubriko "Inter ni". Des malpli ni volas deflankiĝi de nia celo en aliaj direktoj. Neniu penu trudi al ni fremdajn taskojn, fremdan laboron.*)

Koncerne la materialon pri liberecana movado kaj teorio ni deklaras, ke la "Libera Laboristo" estos libera organo por ĉiuj senaŭtoritatemaj fluoj. Nenia superrego de eĉ unu tendenco. *La redaktado estos nur teknika*. Pri sia artikolo respondos la aŭtoro mem. Se la redaktoro konsideros iun artikolon danĝera, li ĝin ne malakceptos, sed nur prokrastos la aperigon, submetante samtempe la artikolon (aŭ komunikon) al prijuĝo de iu loka grupo de Tles. Okaze de malkonsento de ĉi tiu grupo decidas la juĝo de alia grupo. Tiu procedo estas elektita por garantii al ĉiuj kunlaborantaj liberecon kaj eviti misagadon de provokistoj, kiuj certe penos fuŝi nian laboron. La supredirito tamen rilatas nur individuajn artikolojn. Ĉiu skribaĵo de iu-ajn kontre-aŭtoritata organizaĵo estos akceptita senkondiĉe kaj senrezerve. Estas postulata nur koncizeco. Do ĉiuj sinceraj kaj seriozaj anarkiistoj, sindikalistoj, unionistoj de A. A. U. E. kaj aliaj proletaj liberecanoj povas plenlibere eklabori por nia revuo. Ili fine posedas liberan kampon por esprimi sian vidpunkton. Ili fine havas sencenzuran espzimilon por siaj pensoj. Ŝajnas, ke la pozicio de l'organo estas klara. Ĝia fizionomio dependos de kunlaborantoj mem.

Nun kelkaj paroloj pri niaj planoj. Ni starigu bone funkciantan *presservon*. Nek unu kongreso kaj konferenco liberecana, nek unu striko gvidata de revoluciaj senŝtatanoj restu sen nia mencio pri ili. Nek unu nacilingva liberecana gazeto ekzistu sen speciala rubriko „Pere de Esp.o. Servo de TLES". „Almiliti ĉiujn liberecanajn organizaĵojn kaj gazetojn" — jen estu nia gvidparolo!

Niaj unuaj kaj ĉefaj sieĝendaj kaj atakendaj „malamikoj" estas: 1. Internacia Laborista Asocio, kiu jam akceptis nian servon. Al ĝi ni montru, ke nia organo utilas al ĝi ne malpli, ol giaj navilingvaj bultenoj. 2. A. A. U. E. (ĝenerala Laborista Unio, Unuecorganizaĵo) ankaŭ ekvidu kaj trovu en

*) Al k.doj, kiuj estas malkontentaj pri la nuna gvidado de SAT kaj kiuj certe ekdeziros uzi nian revuon por batali kontraŭ la devioj de ĉi-organizaĵo, ni devas diri, ke ni ne gvidos ĉi-batalon, nek povas dediĉi niajn paĝojn al ĝi. Ni havas alian laboron, pli gravan, pli urĝan kaj pli valoran.

ni sian esprimilon. 3. Hispana C.N.T. 4. Norvega N.S.F. kaj 5. Franca „Union Anarchiste". Ankaŭ ni ne forgesu, ke „Portugala Anarkiista Unuiĝo" decidis en marto 1923, ke ĝia internacia korespondado okazu nur en esp.o.

Plue ni formu sieĝan cirklon ĉirkaŭ jenaj liberecanaj organoj: 1. „Le Libertaire", 2. „Revue Internationale anarchiste", 3. „Solidaridad Obrera", 4. „Accion social Obrera", 5. „La Batalha" (Protugala), 6. „Erkenntnis und Befreiung", 7. „Die Vrije Socialist", 8. „La Protesta" (Argentino), 9. „Pensiero e Volontá", 10. „Rodo Undo Sha" (Japanio).

Ĉiu numero de revuo estu nepre tradukata kaj per niaj artkoloj-obusoj (bombardiloj) ni ataku kaj superŝutu ĉi-supre nomitan tendaron. La saman laboron en renversa direkto ni ankaŭ ne malatentu. Ĉion plej valoran kaj originalan ni traduku el nacilingva liberecana gazetaro kaj sendu por nia revuo. La lasta ludos la rolon de centro por tiu interŝanĝo. Se ĝi ne sukcesos ĉion presi, ĝi povas sendi gravan materialon al siaj perantoj diverslandaj, kaj tiuj uzos ĝin sammaniere. Por tion efektivigi ni devas nur agi metode, persiste, organizite. Ĉe ĉiu gazeto organiziĝu rondeto tradukista, kiu tuj interrilatu kun la administracio. Ĉe ĉiu landa liberecana organizaĵo formiĝu „servo de TLES", kiu tuj interrilatu kun la ĝenerala sekretario. Pri ĉiu farita servo, represo, noto, praktika helpo per TLES-aparato komuniku al la redakcio de la „Lib. Lab." kaj sendu specimen-numeron. Se ni konscience kaj energie eklaboros super ĉi-plano, ĉu povas esti eĉ ombro de dubo, pri nia sukceso? Certe ne! Do. al laboro, amikoj! Por la profito de la tutmonda proletaro! Saluton! *La iniciatintoj.*

# La moderna anarkiismo.

„Dum ĉiuj epokoj en la homsocioj sin renkontis batale du malamikaj fluoj. Unuflanke — la popolo, popolmasoj estis ellaborantaj kiel kutimon multon da institucioj, necesaj por ebligi la vivon en socio. Aliflanke-ĉiam ekzistis homoj, kiuj estis grupiĝantaj kaj subtenantaj unu la alian por regi la popolon, ĝin obeigi, administri kaj laborigi ĝin por ili."[1]) La tuta historio de l'homaro estas historio de socia batalo, de konstanta batalo inter du sociaj klasoj ekspluatatoj kaj ekspluatantoj („popolo kaj „estroj" laŭ la terminologio de Kropotkin). Kaj en tiu-ĉi batalo la klasoj formas siajn idealojn, sian ideologion, en kiuj reflektas iliaj aspiroj, iliaj bezonoj, kiuj fariĝas ilia batalforto. Anarkiismo, aŭ senaŭtoritata komunismo, estas ideologio de ekspluatatoj. "Samkiel socialismo ĝenerale anarkiismo naskiĝis en la sino de l'popolo kaj tial ĝi konservas sian vivkapablon kaj kreivan forton nur ĝis kiam ĝi restos popola."[2]) "Neniam anarkio estis idealo de l' regantaj klasoj. Sed ofte ĝi estis pli-malpli konsciata *idealo de l' masoj.*"[3]) Anarkiismo havas sian historion, kiun kelkiuj kondukas eĉ de l'antikva filozofio. Ĉi lasta vidpunkto tamen ne estas tute vera. Efektive en la daŭro de l' kulturhistorio ni ofte renkontas anarkiismajn tendencojn ĉe iaj pensuloj aŭ en iaj popolmovadoj. Sed ili estas nur tendencoj; anarkiismo kiel sistemo (teoria kaj praktika) aperas nur en la dua parto de l' XIX a jarcento, en la epoko de la disfloro de l'kapitalismo kaj aktiviĝo de l'revolucia proletaro. La modernan anarkiismon kiel ideologion (teorian kaj praktikan) kreis la proletaro kiel organizita batalanta sociklaso (la sekcioj de l'internacio, poste laboristaj sindikatoj).

*La revolucia proletaro — jen estas la vera kreinto de l'anarkiismo!*

Anarkiismo estas tamen ne nur idealo de l'proletaro kaj ne nur speciala klasa bataltaktiko. Havante siajn profundajn radikojn enla latenta kreiva energio de l'ekspluatataj sociklasoj, anarkiismo samtempe bazas sin sur la tuto de l'moderna scienco kaj tekniko por helpi la progresantan evoluon de l' socio; tial ni rajtas paroli pri la moderna anarkiismo kiel pri scienco.

Scienca anarkiismo (ni uzas la terminon "scienca anarkiismo", por ke oni ne intermiksu ĝin kun pluraj subjektivaj spekulativaj doktrinoj pretendantaj porti la titolon „anarkiismo") estas laŭ difino de Kropotkin — kiu plej bone formulis ĝiajn fundamentojn — mondkoncepto bazita sur mekanikeca kompreno de fenomenoj,[4]) ampleksanta la tutan naturon, inkluzive la vivo de l' homsocioj.

Ĝia esplormetodo estas metodo de l'natursciencoj per zimetodo estas kontrolenda ĉiu scienca tezo. Ĝia tendenco estas, fondi sintezan filozofion ampleksantan ĉiujn fenomenojn de l'naturo — inkluzive la vivo de l'homsocioj kaj ties ekonomiaj, politikaj kaj moralaj problemoj."[5])

Tiamaniere anarkiismo en sia moderna formo — laŭ Kropotkin — estas mondkoncepto scienca, koncepto ne nur ligita kun la moderna scienco per siaj fundamentaj principoj kaj metodoj, sed rezulto, produkto, sintezo de l' scienco. Ĉi lasta en sia moderna formo ne plu bezonas la hipotezon, kiun povis neuzi Laplace, nek la metafizikajn "vortetojn", kiujn primokis Goethe. Ni jam povas legi la libron de l'naturo t.e. la evoluon de l'organisma vivo kaj de l'homaro ne postulante kreanton, nek mistikan „vivoforton", nek senmortan animon, nek la trilogion de Hegel kaj ne kaŝante nian nescion sub iuj metafizikaj simboloj, al kiuj ni mem atribuis realon ekziston. La mekanikaj fenomenoj — estiĝante pli kaj pli kompleksaj proporcie kun la transiro de fiziko al vivo — fenomenoj, sed restante ĉiam la samaj mekanikaj fenomenoj, sufiĉas por interpreti (klarigi) la tutan naturon kaj la vivon organisman, intelektan kaj socian."

Scienca anarkiismo estas do karakterizata, samkiel la scienco ĝenerale, per sia determinismo, kinematika materialismo kaj per sia naturscienca indukt-dedukta esplormetodo.

En la naturo ĉiu fenomeno estas kaŭze interligita kun aliaj fenomenoj determinita de ili. Determinismo estas la ĉefa trajto de l'natura ordo, neniu fenomeno en la naturo estas sendependa, nedeterminita. La konstanta kaŭza interrilato de naturfenomenoj estas nomata naturleĝo. Trovi, maltrovi la leĝojn de l'naturo — jen estas la unua tasko de l' scienco. La scienco skrupule kolektas faktojn indukte, ĝeneraligas ilin kaj konstruas hipotezon, kiu estas verŝajna klarigo de l' faktoj, nur verŝajna. Tiu-ĉi hipotezo, kontrolita per apliko al multaj aliaj faktoj, povas fariĝi naturleĝo, se ĝi sufiĉas por dedukte klarigi ĉiujn-ĉi novajn faktojn.

La leĝoj de l'naturo tute ne dekretas, kio estas okazenda; ili parolas nur pri tio, kio estis kaj estas okazanta. Sed ĉar ni scias, ke la interdependo de fenomenoj en la naturo estas konstanta, ni rajtas en certa grado antaŭvidi la estonton. Antaŭvidi la estanton por ĝin influi — jen estas la celo de l'scienco.

[1]) La Science moderne e l'anarchie. (La moderna scienco kaj la anarkio.) Kropotkin.
[2]) Kropotkin l. cit.
[3]) Kropotkin l. cit.

[4]) Pli bone — aldonas Kropotkin — estus diri kinematika, ĉar per ĉi-lasta estus esprimita la *konstanta movado* de l'materio.
[5]) Kropotkin l. cit.

**Helpu al la disvastigo de „Libera Laboristo"!**

Karakteriza trajto de l'scienca anarkiismo samkiel de l'moderna scienco entute, estas la kompreno de l'evoluprocedo. En la naturo ekzistas nenio statike. Konstante kaj senĉese ĉio moviĝas kaj ŝanĝiĝas. "La evoluo — kiel komprenas ĝin *Kinematika Materialismo* — estas senfina movado de ĉio ekzistanta, seninterrompa ŝanĝiĝo de l'mondo — en ĝia tuto, samkiel en ĝiaj partoj — de l'origino ĝis senfino." En ĉiu objekto, en ĉiu naturfenomeno ekzistas malsamaj elementoj; kies interna batalo rezultigas pereon de iuj kaj venkoj de aliuj, okazas interna ŝanĝo, procedas evoluo. "Ne ekzistas fenomeno en kiu la evoluo ne estas okazanta samtempe en du direktoj — al morto kaj renaskiĝo; tio estas kvazaurezultanto de l'evoluo al progreso kaj dekadenco", diras la fama scienculoanarkiisto Elisée Reclus.

Tute erare oni opinias, ke batalo inter diversaj partoj, elementoj de iu fenomeno okazas nur dum la periodo de revolucio, kaj ke evoluo estas io esence alia ol revolucio.

"Ekzistas diroj fariĝintaj proverboj — diras Reclus — kiujn homoj uzas aŭtomate kvazaŭ ne penante pripensi ilian enhavon. Tia estas ekzemple la formulo de Linnée. "Non facit saltus natura." Certo la naturo ne faras saltojn, sed ĉiu evoluo en ĝi procedas pro translokiĝo de fortoj nove alceligitaj. La ĝenerala disvolviĝo de l' vivo de ĉiu estajo aparte aŭ de tuta aro da estajoj nenie prezentas al in rektan kontinuecon, sed kontraŭe, iuj ĝiaj fenomenoj aperas post aliuj kvazaŭ perforte kaj revolucie . . . kaj por la grandaj historiaj revolucioj restas la sama leĝo: kiam malnovaj vivoformoj ne kontentigas plu la socion, la vivo postulas novajn, okazas revolucio."

La scienco vidas do nenian kontraŭdiron inter la du vortoj — evoluo kaj revolucio —, kiuj tre similas unu la alian, sed kiuj estas uzataj en la komuna lingvo en tute alia senco, diferanta de ilia origina signifo. "Oni povas diri, ke evoluo kaj revolucio estas sinsekvaj aktoj de la sama fenomeno: evoluo antaŭiras revolucion, kiu siavice evoluos al nova revolucio."

Ĉio-ĉi dirita pri la scienco ĝenerale rilatas en plena grado al la scienca anarkiismo, ĉar ĉi lasta, kiel ni jam vidis supre, prezentas aplikon de l'scienco al la esploro kaj studo de l'homsocioj. Kaj tial plej valora en la scienca anarkiismo estas ne tia aŭ alia tezo, ne tia aŭ alia postulo, sed la metodo. Scienculo povas erari en siaj konkludoj, same povas erari anarkiisto, sed la scienca esplormetodo permesas per objektiva analizo kaj kritiko trovi la eraron kaj ĝin forigi. Jen kial la genia scienculo-anarkiisto. Kropotkin metante la demandon. "Ĉu pravas anarkiismo en siaj konkludoj?" ne respondas ĝin jese, nek nee. Li diras: "Tion montros al ni unuflanke la scienca kritiko de ĝiaj (de l'anarkiismo) principoj, aliflanke — la praktika vivo. Sed ekzistas unu punkto pri kiu anarkiismo ekster ĉiu dubo absolute pravas. Tio estas — ke ĝi rigardas la studon pri sociaj institucioj, *kiel fakon de l'naturscienco*j, ke ĝi forlasis por ĉiam metafizikon kaj alprenis kiel pensmetodon tiun metodon, kiu servis al la kreo de l'moderna scienco kaj de l'materialisma filozofio de nia epoko. Pro tio se anarkiistoj faros en siaj konkludoj iujn erarojn — ili tre facile povos rekoni ilin. Sed ti-kiuj deziros kontroli niajn konkludojn, devas memori, ke tio estas ebla nur per la helpo de l'scienca indukt-dedukta metodo, sur kin sin bazas ĉiu scienco kaj sur kiu disvolviĝas la tuta scienca mondkoncepto.

El la ĝenerala determinismo, kiun la scienca esploro konstatas en la naturo, sekvas determinismo historia. Historian determinismon oni tamen ne devas miksi kun historia fatalismo. Fatalismo estas kredo pri neŝanĝebla fato, neevitebla destino; laŭ ĝi la homa volo voloras nulon, havas nulan efikon. Dum scienca determinismo tute ne neas la signifon de homa volo; la homo ne estas pasiva materialo, sed aktiva aganto, faktoro de l'socia evoluo, kvankam ne ĉefa; ankaŭ ĝi estas determinita per la medio, kies produkto ĝi estas.

Estante konsekvenca en siaj materialismaj fundamentoj scienca anarkiismo en sia sociologia parto agnoskas historian materialismon: ne ideoj estas la ĉefgvidantoj de l'historio, sed materialaj ekonomiaj agantoj, kies produkto, reflekto en la cerboj de homoj estas la ideoj mem.[6]) "Esplorante la tuton de ĉiu historia movado — diras la konata holanda anarkiisto Cornelissen[7]) — ni vidas, ke ĝi havas bazon ekonomian. La elementoj de ĉi-bazo estas divideblaj en du kategorioj, kiuj interplektiĝas; la unua — ĝenerala — konsistas el naturaj kondiĉoj, ekzemple: tero, klimato, ĝenerale karaktero de l'naturo; la dua — speciala — ampleksas la formojn de l'produktado kaj la distribuon de necesaĵoj en ĉiu periodo de civilizo."

Dum la unua kategorio restas relative neŝanĝebla (ĝi ŝanĝiĝas tre malrapide), la dua estas konsiderenda kiel fundamenta faktoro de l'historia evoluo. Certe la geografia faktoro determinas la ekonomian faktoron mem. La geografia medio estas aktiva aganto (ne nur kondiĉo, kiel tion bone montris en sia rimarkinda verko L. Meĉnikov), sed ĉar la ekonomia faktoro agas pli aktive kaj pli senpere, ĝi certe estas fundamenta por la historia evoluo. Sed ekonomia materialismo en la kompreno de l'historia evoluprocedo tute ne signifas, ke homaj ideoj ludas nulan rolon en tiu procedo. "La ekonomia bazo determinas la tutan intelektan kaj moralan disvolviĝon de l'homo, sed ĉi-lasta povas siavice influi la materialajn kondiĉojn de l'vivo, t. e. la ekonomiajn faktorojn."[8]) La ideoj povas en ia grado influi la historian proceden, sed ili mem — la ideoj — esats ne primaria sed derivita faktoro.

---

[6]) En la historiaj verkoj de l'anarkiistoj ne ĉiam estas klare substrekita kaj ne ĉiam konsekvenca tiu historia materialismo. Sed ni ne forgesu, ke la autoroj de ĉi verkoj estis nur homoj, kaj *"errare humanum est"*. Kulpas ne anarkiismo, kiu estas pure materialisma scienco, sed anarskiistoj, kiuj ne ĉiam sufiĉe profunde alproprigis la principojn kaj la metodon de l'scienca anarkiismo.

Tamen necesas diri, ke por du geniaj scienculoj-anarkiistoj — Reclus kaj Kropotkin — estis klare, ke la ekonomia faktoro estas la ĉefa faktoro en la socia vivo. Akcentante la gravecon de l'geografia faktoro kaj konstatante ĝian aktivan rolon, Reclus tamen diras: "La karaktero de l'civilizo kaj de l'socia ordo dependas precipe de tiu maniero de la adaptiĝo al la kondiĉoj de l'ĉirkaŭanta medio, kiun praktikas tiu aŭ alia popolo" (vidu lian antaŭparolon al la verko de C. Meĉnikov "Civilizo kaj la grandaj historiaj riveroj"). Kaj Kropotkin, malaprobante la reprezentan registaron, firme akcentas la ĉefan rolon de l'ekonomia faktoro. Li diras (v. "La paroloj de Ribelulo" ĉap: "reprez registaroj): "Observante la disvolviĝon de homsocioj, ne atentante ĝiajn akcesorajn kaj provizorajn signojn, ni konstatas, ke la politika reĝimo ĉiam esprimas la ekonomian". Li akcentas, ke "se okaze de revolucio la politika reĝimo antaŭigos la ekonomian staton de la lando, ĝi restos senviva litero, formulo skribita en ĥartio, sen praktika apliko". Kropotkin malaprobas la reprezentan registaron ne nur tial, ke ĝi estas perforto, sed ankaŭ tial, ke ĝi ne plu konformas al la venanta ekonomia fazo. Li diras, ke ne nur la reprezenta registaro estis necesa kaj siatempe progresa, sed la monarkio ankaŭ. Al ni ŝajnas, ke la aserto de K: "la venonta ekonomia fazo postulas novan politikan organizon havantan nenion komunan kun reprezentado" havas pure materialisman karakteron. Ne materialismon en historio estis malaprobanta Kropotkin, sed dialektikan metodon, konsiderante ĝin ne scienca, kaj la ekonomian fetiĉismon de Marksistoj.

[7]) Cornellissen: En Marche vers la société nouvelle (sur la vojo al la nova socio).

[8]) Cornellissen l. cit.

---

**T. L. E. S. bezonas vin, aktivulo!**

La progresoj de l'tekniko, la ŝanĝo de l'ekonomia stato de l'socio elvokas ŝanĝojn en la socia ordo. Krazaŭaŭtomate la homaro venos al organizo, en kiu la laboriloj, la tero, la minoj kaj ĉiuj produktitaj riĉaĵoj fariĝos ĉies propraĵo. Samtempe pli kaj pli disvolviĝos l'aŭtonomio de la loĝantaro de landoj, distriktoj, komunumoj; liberaj organizaĵoj de laborantoj ĉiam pli kaj pli ebliĝos. La tasko de l'nova socia ordo estos certigi maksimuman bonstaton kaj liberon al individuoj, sen domaĝo por aliuj.[9]) Tiu socia ordo — anarkiia komunismo — estas ne utopio, ne nia abstrakta idealo, sed neeviteble venonta fakto en la ĉeno de l'historia procedo. "Ĉi-prognozo estas bazita *sur studo de l'tendencoj rimarkataj en la socio dum ĝia nuna evolustato.* Ĉi-tie ni eliras ekster la regiono de utopiaj revoj kaj eniras regionon de pozitiva scieno — scienca prognozo."[10])

Kiuj estas la vojoj de l'socia evoluo? Malsama ekonomia stato de diversaj homgrupoj faras el tiuj grupoj soci-ekonomiajn kaj ideologian unuecajn klasojn. "La historio de l'homaro aŭ de iu aparta popolo dum la tuta periodo de ĝia ekzisto — diras Cornelissen — estas nur historio de sistema ekspluato de iu kategorio, klaso — per aliu."[11]) La tuta historio de l'homaro estas historio de klasbatalo kaj samkiel la evoluo de ĉiu fenomeno ĝenerale procedas pro interna batalo de ĝiaj malsamaj elementoj, pro translokiĝo de fortoj (Reclus), same la procedo de l'historia evoluo okazas pro interna batalo de malsamaj sociaj klasoj — ekspluatatoj kaj ekspluatantoj kiu kondukas al translokiĝo de l'sociaj fortoj — revolucio. En la provedo de ĉibatalo la klasoj organiziĝas kaj formas siajn batalrimedojn. La necesoj de l'batalo por ĝia bono disvolvas en la klaso de l'ekspluatatoj solidarecon, interhelpon.

En la moderna socio kapitalisma — la du batalantaj klasoj estas: proletaro kaj burĝaro. La antagonismo inter ili kreskas paralele kun la evoluo de l'kapitalismo al ĝiaj plej superaj formoj. La proletaro formas siajn klasorganizaĵojn-sindikatojn, kiuj gvidas la batalon kontraŭ la kapitalistaro. Estante klasbatalaj organizaĵoj, la sindikatoj havas krom siaj ĉiutagaj taskoj celojn pli larĝajn: ili devos dum la epoko de l'socia revolucione nur detrui la kapitalisman ordon, sed ankaŭ plenumi grandan organizan, konstruan laboron. La sindikato devas fariĝi organo de produktado, gvido, administro kaj defendo de l'nova socio, kaj ĉar la sukceso de l'proletara revolucio dependas ekskluzive de l'kapablo de la laborista klaso kiel tuto, anstataŭigi la privatajn entreprenojn (kaj la kapitalistan ŝtaton), organizi la tutan produktadon kaj ordigi la distribuon de l'riĉaĵoj.[12])

En tiu-ĉi periodo de l'socia revolucio, periodo de l'socia transformiĝo, kiu estos pli-malpli daŭra, la organizita proletaro, kiel klaso organizonta, devos streĉi tutan sian energion, ĉiujn siajn kapablojn. Ĝia iniciativa klas- kaj celkonscia parto devas zorgi pri la preparo al la socia revolucio jam nun, dum la periodo antaŭrevolucia. Sen tiu prepara laboro la sukceso ne estas atingebla: *ĝis kiam la laboranto ne scios, kion li bezonas kaj kiel tion atingi — prave diras Kropotkin[13]) — li estos devigata resti sklavo de tiu-kiu scias."*

Ellaboro de konkreta programo por socia konstruado dum la revolucia periodo ne estas konstruo de kimeraj kasteloj, nek enkatenigo de l'revoluciaj fortoj, kiun timas iuj el niaj kamaradoj. Ĝi estas reala neceso, sen kiu ni restus vantaj babiluloj. Ĉu ni havas tian programon, tian agadplanon?

Ni sincere konfesu: ne!

En la tuta moderna socialismo kaj precipe en ĝia modera parto — diras Kropotkin[14]) —, ni vidas klaran tendencon ne profundigi la principojn de socio triumfenda per la revolucio . . . Rilate al anarkiistoj — la timo ekvidi sin dividitaj pro l'problemo de l'estonta socio kaj paralizitaj en ĝia revolucia ekmovo — efikas je ili samsence. Oni ordinare preferas ĉe la laborantoj prokrasti ĉiujn diskutojn, kiujn oni (tute nejuste) nomas teoriaj, kaj oni forĝesas, ke eble post kelkaj jaroj ili (t. e. la laborantoj) devos eldiri sian opinion pri ĉiuj problemoj de socia organizo, komence de l'funkciado de bakfornoj ĝis la funkciado de lernejoj aŭ defendo de l'teritorio, kaj tiam ili ne havos avan (antaŭ) si la ekzemplojn de l'angla revolucio, per kiu estis inspirataj la Gironde-anoj de l'pasinta jarcento.

Krom la organizo kaj plifortigo de l'proletaraj klasorganizaĵoj estas absolute necesa granda prepara *teoria socioteknika laboro:* "Estas necese, ke tiuj novaj ideoj, kiuj markos novan originon en la historio de l'civilizo, estu projektitaj antaŭe, ĝis la revolucio, ke ili estu intense disvastigataj en la masoj por esti kritikataj de prakitkuloj kaj por esti en certa grado eksperimente taksataj[15] kaj [16]) kaj tiu-ĉi prepara laboro ne estas prokrastenda. Venis tempo ĝin komenci. Ni ne forgesu, ke ĝi estas eksterordinare serioza kaj malfacila, sed plenumenda kaj plenumebla. "Estas necese — diras Kropotkin — pristudi la erarojn de l'antaŭaj revolucioj samkiel iliajn bonajn flankojn . . ., pristudi kamaradece rimedojn por eviti ĉi-erarojn aŭ almenaŭ malpliigi ilin laŭeble.

La revolucio estas ja ne senkonscia detruanta ribelo, ĝi estas granda kaj daŭra laŭsistema organiza laboro por transformi la socion.

Difininte klare en nia konscio, kion postulos de ni la nuna etapo de l'klasbatalo kaj ĝiaj prespektivoj, ni fervore laboru por plenumi tiujn postulojn de l'vivo. Ĉi-laboro estas parto de l'preparo al la konstruado de l'venonta anarki-komunismo.[17])

ALIZ.

[9]) Cornellissen l. cit.
[10]) Kropotkin — La moderno scienco kaj anarkio.
[11]) Cornelissen l. cit. p. 2.
[12]) Cornelissen l. cit.
[13]) Kropotkin "L'anarkiista agado dum la revolucio."

[14]) Kropotkin l. cit.
[15]) Kropotkin l. cit.
[16]) La anarkiisma sociologio postulas konfirman socioteknikon Bedaurinde la socioteknikan flankon de l'anarkiismo oni preskaŭ; tute ĝis nun ne tuŝis. En Rusio fratoj Gordin skirbis pri ĝi, sed ili tute kripligis la ideon. Ni intencas prepari specialan artikolon pri ĉi-temo.
[17]) Ni petas ĉiujn kamaradojn tradukontajn ĉi-artikolon sendi du ekz. de l'jurnalo, kie aperos la traduko, al "Esperanto" 9, Rue Louis Blanc, Paris, Francio. La samon ni petas fari kun ĝiaj kritikoj.

**Ĉu vi jam fondis pres- kaj informservan ĉelon en via urbo?**

# La batalo pro la ĉiutaga pano.

de Rudolf Rocker.

(Tradukis L. Heinrichs, M.-Gladbach.)

## Pri klasbatalo.

Oni min petis, ke mi diru kelkajn parolojn pri la signifo de l' klasbatalo speciale por la esperanta kaj rusa eldonoj de mia verko "La batalo pro ĉiutaga pano". Al ĉi deziro mi volonte respondas, kvankam estas ne malkompreneble, ke mia verko ne nur estas rekomendo de l'klasbatalo, sed nursole el rekono de ĉi ideo ĝi naskiĝis. Tamen estas donata okazo al mi per ĉi instigo, diri mian opinion al tiuj kamaradoj de l'anarkiista kaj ĝeneralsocialista movado, kiuj kredas devi nei la klasbatalon pro diversaj kaŭzoj. Plej oftetio okazas pro pretekste etikaj kaŭzoj, aŭ pretekste, ke anarkiismo kaj socialismo finfine ja ne estas monopoloj de iu certa klaso. Aliaj

eĉ pli akras, asertante, ke nia propagando de l' klasbatalo kaŭziĝas el resto de malnova marksisma ideologio, kiun ili, starante sur "pli alta observejo" estas formetintaj jam delonge. Pro ĉi kaŭzo estas nekonvene paroli en ĉi cirkloj pri klasbatalo kaj oni konversacias tie pli volonte pri la batalo pro "etikaj valoraĵoj", pri "kulturbatalo" kaj similaĵoj perceptataj iel ajn.

Sed ĉiaj filozofiado kaj spekulacio ne povas forigi el la mondo la fakton, ke la klasbatalo ekzistas; oni proas diversopinii pri ĝia signifo, sed fakte ĝi ekzistas. Ne utilas ĉiokaze sofismo nek teorieca diskutemo. Klasbatalo ne estas abstrakta ideologio, sed viva efektiveco, kiu ne venis el ĉambro de sciencisto.

Socio, kiu bazas sin sur privatmonopolo kaj sur ekspluatado de la larĝa amaso, ne povas havi internan unuecan konsiston kaj laŭ strukturo ĝia dividiĝas ĝi je klasoj diversinteresataj, kiuj ne estas unuigeblaj "sub nur unusama ĉapelo". Kaj ĉar la homoj nur estas la vivantaj portantoj de ĉi interesoj, ne povas neokazi, ke ili reciproke same akre kontraŭas, kiel la interesoj, kiujn ili havas, kaj kiuj verdire estas la interesoj de tiuj klasoj, kiujn ili anos. La neevitebla rezulto de ĉi sozia konstelacio do estas la batalo de la klasoj, unu kontraŭ la alia, kiu ja en diversaj epokoj havas diversojn formon, sed tamen ĉiam ekzistas kaj estas forigebla per neniaj diroj.

Estas cetere tute indiferente la nomo donata al la afero. Oni ekzemple povas diri kiel Bakunin "amasbatalo", sed kion utilus? Ĉe la kerno de l'afero per tio nenio estas aliigata, ĉar ankaŭ Bakunin komprenis je "amaso" anuavice la laborantan klason en la socio kaj li perceptis la batalon de ĝi kontraŭ monopolo kaj ŝtato precize en la sama senco kiel ni hodiaŭ. La klasbatolo — ĉi esprimo ŝajnas al mi pli trafa kaj pli signifoplena ol ĉiuj aliaj — estas do fakto, kiun ankaŭ niaj estetikuloj devas digesti, kiom ajn ilia belsento baraktus kontraŭen. Faktoj ja estas malmolaj objektoj, kiuj estas fordiskuteblaj el la mondo per nenia filozofio. Ili estas kiel la naturo mem, neignoreblaj.

Tiuj, ki opinias esti trovintaj specialan sciencon; se ili kontraŭas la esprimon klasbatalo kaj profundsignife pledas por "kulturbatalo", helpas per ilia ludado je vortoj nur malklarigi l' aferojn, sen aliigi ion ĉe la faktoj mem. Kian signifon do havas "kulturbatalo". Ĉian, nenian. Eĉ Bismarck la vorton uzis kiam li specialmotive militiris kontraŭ la katolika eklezio, suferonte kompletan malvenkon.

Kion, cetere, oni komprenas je kulturo? Ekzistas mil malsamaj difinoj pri ĉi ideo, kiuj ne malofte kontraŭas sin tute. Plej vaste komprenata "kulturo" estas laŭnatura unuigo de ĉiuj fizikaj kaj spiritaj fortoj de la homoj en iu certa socia periodo, kie ĉiuj esprimoj de l'socia vivo de milionoj de diversaj punktoj eliras en kreema celado al komuna centro kaj de tie refluas, tio komparebla al cirkulado de la sango. Laŭ tia vidpunkto la nuna periodo ekzemple kun ĝiaj akraj klasdividoj tute ne estas kulturperiodo kaj nur povus esti nomata periodo de la civilizacio, en kiu la grandegaj teknikaj progresoj konkuras kun elradikigo de l'unuopulo kaj detruo de la socio.

Vidante la ideon kulturo en tia signifo, oni ekkonas, ke la klasbatalo de la subpremitaj kaj ekspluatataj amasoj estus kulturmovado en plejebla senco de la vorto, ĉar ĝi celas socian unuecon de la kulturaj fortoj, kiu atingus kulminacian punkton ĉe forigo de la klasoj kaj monopoloj kaj ĉe komuneco de ĉiuj materialaj kaj spiritaj kulturaĵoj. Sekve la arbitre konstruita diferenco inter klasbatalo kaj kulturbatalo estas sensprita kombinaĵo farata de homoj, kiuj emas ĵongli vortojn, kaj kiuj neniam penis kompreni la kernon de l'afero.

La kontraŭuloj de la klasbatala ideo en la socialista movads kredas havi ĉefargumenton kontraŭ ĝi en la leĝoj de l' etiko, kiu laŭ ilia opinio devus droni nepre en klasbatalo, ĉar ĉe defendo de materiaj interesoj forestus ĉia etika principo.

Ĉi kompreno de l' afero pruvas, ke tiuj, ki esprimas ĉi opinion havas neniujn spertojn pri klasbatalo. La klasbatalo ankaŭ havas sian etikon, kiu ja ne similas al la dolĉecaj fabrikaĵoj de platonaj mondplibonigantoj.

Ĉiu vera etiko havas sian radikon en la sento de komuneco. Ju pli profunda estas ĉi sento en la homo, des pli alta estas lia etika sento. Sed kie ne plu ekzistas komuneco, tie ĉiu moralsistemo estas sensprita frazo, malenhava diro. Ĉu ne la tielnomata kristana moralo estas la plej konvinka ilustraĵo al ĉi fakto? Kia edifa bildo: riĉaj armilfabrikantoj, kiuj preparas profite al si amasbuĉadon, subtenas finance la konstruon de preĝejoj! Aŭ tiuj pastroj, kiuj laŭ bezono benas kanonojn kaj predikas amon al proksimulo! Ĉi tie la malkomuneco de interesoj en la socio kaŭzas staton sen viva moralo.

En ĉi senco tre trafa estas sekvanta ŝercaĵo:

Vilaĝano demandis la pastron: "Honorinda singoro pastro, ĉu ne estas malhomece mortpafi alian homon, fraton, pro lia alia konvinko?" — "Kara filo", respondis la pastro, "la diaj leĝoj pli valoras al la homoj! En la sankta biblio ni legas: "Kaj Kajno mortbatis sian fraton Abel' kaj je alia loko ni legas: ‚Iru por fari la samon'!"

Klasbatalo de la proletariaro eliras el la komuneco de la klaso, ĝia laŭnatura bazo estas la solidareco de la samsortanoj. Solidareco estas kaŭzata de etikaj principoj. Ĉu la ribelo de sklavigitaj amasoj kontraŭ centjara maljusteco ne estas etika faktoro? Ĉu ĝi ne venas el sento de sociala justeco, kiu estas la plej grava kondiĉo de ĉiu vera etiko? Eĉ la plej malgranda nesignifa salajrbatalo ne nur bazas sur materiaj interesoj, sed ankaŭ sur etikaj valoroj. Aŭ ĉu la konstanta propagando, kiu ĉiam denove akrigas al la unuopa laboristo la konsciencon, agi por liaj kamaradoj kaj solidari kun ili en batalo, ĉu gi ne estas portata de etika principo? Ĉu ne la tielnomataj solidarstrikoj, ĉe kiuj ekstrikas tutaj laboristkategorioj por helpi al la klasfratoj de iu industrio, ĉu solidarstrikoj ne estas manifestadoj de grava etika prinzipo, kiu pli valoras ol ĉiuj etikecaj beldiroj de la etikuloj?

Sen certaj etikaj principoj, kiuj venas el la sento de komuneco, eblus por la subprematoj neniu klasbatalo. Certe ja ĝi estas etiko naskita el bataloj kaj suferoj, kiu trovas sian radikon en la kamaradeco de la klaso, kaj kiu kunfandita per sango, larmoj kaj komunaj esperoj estas pli forta ligilo ol la malprofundaj paroloj de la moralpastroj.

Ankaŭ la aserto, ke nia emo al klasbatalo bazassur resto de malnova marksisma ideologio, estas same absurda kaj nepruvebla kiel ĉiuj aliaj "argumentoj", kiujn oni direktas kontraŭ ni. Ni ne estas marksistoj, ĉar ni ne konsentas al iuj certaj ideoj de Marx-a doktrinaro. Tamen estus sensence, se oni volus nekonstati, ke Marx, parte el si men, parte instigita de antaŭuloj, disvolvis kelkajn certajn pensojn, kiujn ankaŭ ni aprobas, kaj kiuj havas ĉiaman valoron por la idearo de l'socialismo. Plue la samaj rilatoj ekzistas ankaŭ inter la ceteraj socialistoj pensuloj kaj ni. Kiu ideon neas nur *tial* ke ĝi eliras de persono, kiu en alia rilato estus nia kontraŭulo, tiu estas simpla dogmemulo, kiu ne povas utili al la liberecana movado. Ne gravas, *kiu* esprimas ideon, sed gravas, *ĉu la ideo eliras de rezultoj kaj spertoj de l'praktika vivo kaj ke ĝi estas pruvata ĉiam de ili.*

Cetere la tuta supozo estas erara, ĉar ne estis *Marx,* kiu kiel la unua ekkonis la signifon de la klasbatola en la historio kaj ĝin rekomendis. Ĉi ideo jam en pleja klareco ekzistis, kiam Marx ankoraŭ estis en tendaro de burĝa demokratio. Fakto estas, ke tuj, kiam la socialismo enradikiĝis en la nove formiĝinta laboristmovaldo, pliumlto de ĝiaj teoriuloj ekkonis la signifon de la klabatalo. La faktoj de la vivo gvidis ilin al ĉi ekkono. Ĉu ĉi ekkono ne esprimas sin klasike akre, se *Proudhon — antau* Marx — diris: "La milito de la posedantoj kontraŭ la neposedantoj estas la tuta enhavo de l' mondhistorio!"? Similaj elparoloj troviĝas je dekoj en la verkoj de malnovaj socialistoj kaj antaŭuloj de Marx kaj Engels: Louis Blanc, Considérant, Blanqui, Weitling, Grün, Hess, Marr kaj de multaj aliaj.

Dum la socialismo ekzistis nur en la cerboj de unuopaj pensuloj kaj de iliaj ne multnombraj anoj, ĝiaj propagandistoj ankoraŭ povis eraropinii, ke oni nur devus varbi la posedantajn klasojn por la novaj ideoj, por povi efektivigi ilin. En ĉi direkton agitis *Saint-Simon* kaj tuta lia anaro. Influite de ĉi ideo Charles Fourier sin turnis al Polniac, Louis-Filipo kaj al la papo kaj atendis dum dek jaroj la riĉulon, kiu disponigu al li unu milionon da frankoj por praktika eksperimento kun liaj ideoj. Sed tio tuj ŝanĝiĝis kiam la laboristmovado evoluiĝis kaj estis influata de socialismaj ideoj.

Krome ne estas necesa speciala akrevideco por ekkoni, ke admono al la riĉuloj restus seneĥa, se ne la nenionpose-

**Provizore „L. L." aperas 16 paga dumonate.**
**Zorgu, ke ĝi aperos 32 paga ĉiumonate.**

dantoj prenus siajn aferojn en la proprajn manojn. Burĝaj verkistoj: Eugen Sue, Georgo Sand, Viktor Hugo, Thomas Hood, Ebenezer Elliot, Thomas Carlyle, Charles Dickens, Benjamin Disraeli — nur pro citi la plej famajn — montris al la riĉuloj preze kaj poezie korŝirajn bildojn, admonis ilian kompaton kaj petegis ilin helpi al la malriĉuloj. Honoron al la bonvolo de ĉi tiuj verkistoj, sed se la laboristoj mem ne estus formintaj siajn ekonomiajn batalorganizaĵojn, malgraŭ ĉiuj subpremaj malhelpoj de la registaroj, se ili ne estus batalakirintaj pli bonajn vivkondiĉojn, hodiaŭ ni ankoraŭ vivus en la inferno de la komenckapitalisma periodo kun ĝia senlima mizero kaj terura malnobleco.

Emocia "Kanto pri la ĉemizo" eble neniomon impreson kaŭzis ĉe la reĝoj de l'angla teksindustrio. Tamen ĝi devus povi tuŝi la korojn kaj konsciencon de la riĉuloj, *se* poeta forto kapablus efiki sur la interesoj de la posedantaj klasoj.

Povasesti, ke la kortuŝaj versoj de Hood en la luksaj solonoj logis kelkajn larmojn de emocio el okuloj de kompatanimuloj, eble ĝi instigis al kelkaj mildigaj donacoj. Sed pli ili certe ne efikis. Eĉ blindulo tial devus dum la tempo konvinkiĝi, ke la sociala mizero ne estas elmondigebla filantropie. En medioj de posedantoj oni povus konservi tiaj iluziojn, sed ĉe la laborista klaso oni baldaŭ estis kuracitaj de ili. Ĉi tie ĉiutaga sperto zorgis, ke ankaŭ la okuloj de la pleja malsaĝulo maltermiĝis.

La konscia klasbatalo estis la vekiĝo de memkonsidero ĉe la proletariaro. Lacaruso ne plu volis kaŭri en polvo kaj kolekti panerojn, kiuj falis de riĉula tablo. Li iĝis ribelo, revoluciulo kaj serĉis justecon en batalo. Kaj ĉi tie ni trovas denove la gravan kulturan kaj etikan signifon de la klasbatolo por la laboristaro.

Oni ne diru, ke homoj kiel *Saint Simon, Owen, Marx, Lassalle, Bakunin, Kropotkin,* kaj multaj aliaj ja estas vivaj pruvoj, ke ankaŭ en la tiel nomataj altaj klasoj oni povus trovi komprenemon por la postuloj de la socialismo. Ĉi viroj estas *esceptoj,* kiuj nur konfirmas la ĝeneralan regulon. La granda plimulto de la posedanta klaso ne povas esti varbata per belaj diroj kaj citaĵoj sur la leĝoj de la homa etiko; ĝi devas esti venkota en persista batalo, por havigi spacon al nova divolviĝo de sosiaj vivoformoj. La fakto, ke kelkaj idealpensantaj homoj el la reganta klaso aniĝis al la socialismo, neniom aliigas ĉe la ĝenerala situacio de la afero, same neniom kiel la fakto, ke iamaj laboristoj supreniris al ŝtupo de kapitalistoj.

Mi ne ŝatas erarkomprenon. Mi tute ne estas reprezentanto de la teorio pri "kalhava pugno", kiu deziras foreston el la socialisma movado de ĉiu intelektulo aŭ de ĉiu, ki ne servutadas en uzino: *Ne, ĉiu bonvenu, kiu forte volas partopreni nian batalon kontraŭ ekspluato kaj subpremo!* Sed la ekzemplo de eta malplimulto ne konduku nin al erarkonkludoj, kiuj nur povus malutili al la revolucia laboristmovado. Ĉu estas agrable aŭ ne, ekzistas la fakto, kaj nenia sofismo povas kontraŭbarakti: La esenca, plej grava parto de la fortoj, kiuj kolektiĝas por batalo por sociala liberiĝo, estas ĉiam la klaso de la laboranta popolo en urboj, sur kampoj.

Certe ni devas ankaŭ pro tio ne miopiĝi. Ni scias ekzemple tre bone, ke la batalo kontraŭ la posendantoklaso estas direktata preskaŭ en ĉiuj okazaj ankaŭ kontraŭ memboj de nia propra klaso. Mi parolas pri tiuj, ki iloj vole-nevolaj por la posedantoj aŭ por la tielnomata kapitalisma "ordo" ludas certan rolon, kaj ne malofte montras sin plej insistaj malamikoj de la propraj klaskamaradoj. Sed ankaŭ ĉi fakto neniel ŝanĝas ĉe la ĝenerala situacio kaj ĝi neniel etigas la signifon de la klasbatalo. Kontraŭe, ĝi nur pli klare pruvas klasbatalneceson kaj -seneviteblon en la hodiaŭ socio. *Nur la efektivigo de la libereca socialismo, kiu neniigos ĉiujn klasojn, ankaŭ alportos finiĝon de la klasbatalo.*

Ni estas nepre propagandistoj de proletaria klasbatalo, ĉar ni ne konas alian vojon ireblan al liberiĝo kaj efektivigo de la socialismo. Kiu nun ankoraŭ, post ĉiuj spertoj el la historio kaj speciale post la historiaj okazaĵoj de la lastaj jaroj, revas piajn iluziaĵojn, tiu ne estas kuracebla. La paŝado de la okazaĵoj iros trans tiaj iluzioj kaj iluziuloj same kiel trans la senspirita frazado de ŝajnantaj al si mem revoluciaj superradikaluloj, kiuj ja ĉiam *parolas* pri batalo, sed *rifuzas* ĉiun *praktikan agadon* en ĉiutaga batalo por ne forlasi siajn laŭdirajn principojn.

R. R.

*

## La batalo pro la ĉiutaga pano.

Revolucioj malofte alvenas en "konvena tempo". Dum periodoj de socia aflikto oni ja komprenas la neceseeon de elfundamenta aliformigo, kiu nepre devas rezulti el la evoluo de l'sociaj kontraŭoj — sed la momento de l'eksplodo restas pleje duba. Tiel venas, ke dum tempo sempere antaŭeniranta la eksplodon de revoluciaj okazaĵoj la afero ordinare tiel rapidegas, ke la revoluciuloj mem kun surprizo rigardas la okazaĵojn kaj regule estas preparintaj nenion. Tio ankaŭ estas la kaŭzo, kial ĉiu revolucio dum l'unua tempo post ĝia naskiĝo antaŭenmoviĝas tiel hezite kaj palpante — kaj malŝparas siajn fortojn pro senutilaj bagatelaĵoj, anstataŭ ol tuj decideme flankenĵeti la malhelpaĵojn starantajn antaŭ ĝia finvenka triumfo kaj ebenigi la vojon por la kreanta iniciativo de novaj ideoj.

Nur iom post iom inter la ribelantaj masoj kreskas la konscio pri la forto vivanta en ili kaj pelanta ilin al pli radikalaj postuloj kaj pli kuraĝa agado. Kiam revolucio amplekssiĝis tiele ke ĝi kapablas transiri for de ĝiaj unuaj palpantaj provoj al efikaj ŝanĝoj de l'socia vivo tiam ĝiaj akiraĵoj sendube plivaloriĝos kaj pluenkondukos la homojn; kontraŭe, se tiuj unuaj paŝoj estus dekomence malhelpataj kaj pro tio plua evoluo de kreantaj popolinstinktoj estus malakcelataj. Sed — socia revolucio signifanta *pli* ol ordinara politika movado, kiu ne povas kontentiĝi je simpla ŝanĝo de l'politika elpendaĵo — tia revolucio nepre bezonas la eblecon disvolvi siajn kreantajn fortojn, ĉar la revoluciuloj dekomence klare vidas kiel celon: elfundamentan ŝanĝon de ĉiaj formoj de l'socia vivo.

Tial ankaŭ estas fatala eraro, se oni volas taksi revolucion kiel nuran perfortan renversion de malnovaj sociaj formoj kaj konsideras ekskluzive nur la detruantan flankon de ĝia agado. La detruanta karaktero de revolucio estas nur unu el ĝiaj apudaĵoj kaj ĝi tute ne elĉerpigas la plej internan esencon de l'revolucio, ĉar la veran signifon de revolucio oni ne devas serĉi en tio, kion ĝi detruas, sed male en tio, ki estas nove kreita kaj evoluigita de ĝi. Certe oni poste prijuĝos la socian kaj historian valorojn de revolucio laŭ ĝiaj kreintaj tendencoj kaj akiraĵoj.

Tial revolucio estas multe pli kaj multfoje io alia el ordinara ribelo, kvankam ankaŭ tiu povas esti portata de revoluciaj ideoj. Revolucio estas senkateniĝo de ĉiuj novaj fortoj kaj elementoj kreintaj ĝis nun en la sino de l'malnova socio, kiuj alcelas novordigon de l'socia vivo, kaj kiuj nun — en momento de maturiĝo — diskrevigas la malnovajn formojn por formigi al si novan vivon laŭ propraj bezonoj. Oni kompare rigardu infaneton diskrevigantan la kovraĵon dum lasta monato de gravedeco por komenci vivon memstaran. Kaj plua karaktero de Revolucio konsistas en tio, ke tiu renovigo de sociaj vivcirkonstancoj ne estas diktata de supre, sed kontraŭe ĝi elkreskas el rekta kaj senpera agado de vastaj popolmasoj.

Sed tiu plijuniĝo de l'socia vivo per la revolucio estas ebla nur per neinterrompa agado de revoluciaj fortoj *en* la sino de l'malnova socio, per ilia interna kuniĝo kaj la pli — malpli celkonscia maniero de ilia agado. Per senlaca agitado interne de l'malnova socio, per analiza kritiko de malnovaj vivmanieroj kaj la evoluigo de novaj moralaj valoraĵoj la revoluciuloj iom post iom kapablas krei novan spiritan sferon, per kies konstanta disvolviĝo la potenco de l'malnovaj aranĝoj kaj de ĝiaj portantoj konstante estas malfortigata, ĝis kiam fine ĝi tute devos malaperi. Pli vastaj rondoj de l'ekspluatataj masoj iom post iom komprenas la necescecon aliformigi elprofunde la sociajn vivcirkonstancojn kaj instinktive ili komprenas la eblecon de novaj sociaj formoj konformaj al la interesoj de ĉiuj. Sed tiu-ĉi provizore nur instinkta koncepto pri novaj viveblecoj ĉe multaj homoj iom post evoluas kiel klara konscio.

Revolucio estas tute neebla sen tia revolucia masedukado. Ĝi simple estas unua kondiĉo por revolucio. Sed la revolucia agitado atingas sian veran kaj decidan signifon nur ti-kiam ĝi transiras al la ĉiutagaj bataloj pro ĉiutaga ekzistado kaj fariĝas praktika agado. Dum senĉesaj bataloj pro ĝiutagaj bezonaĵoj la fortoj de l'masoj pligrandiĝas, evoluas ilia memkonfido, ilia iniciativo, ilia socia solidareco. Bataloj pro ekonomiaj kaj socialaj plibonigoj, pro pli grandaj politikaj rajtoj kaj libero

**Organizu la T. L. E. S.-movadon en via urbo.**

estas kvazaŭ bataloj antaŭenirantaj la revolucion. Ili en la masoj vekigas la instinktojn de obstina kontraŭstaro kaj evoluigas sentadon pri homindeco. Ju pli forta en la masoj tiu sentado vivas; ju pli iliaj cerboj enhavas ideojn pri nova socia vivo, des pli rapide ni antaŭeniras al nia celo: la venonta revolucio, des pli valoraj eblecoj estas donataj al ni por la fina liberigo de la masoj. Tiel ni devas neniam malatenti la egan gravecon de l'revolucia edukado kaj precipe la valoron de ĉiutagaj bataloj dum la ekonomia kaj politika vivo de l'socio se ni volas ebenigi la vojon al la revolucio celante prepari pli bonan estontecon.

Se ni rigardas tiel la revolucion kaj taksas la novembrajn okazintaĵojn de jaro 1918a laŭ tia mezurilo, ni ne povas malkonfesi, ke la tiamaj okazintaĵoj mal pleje similis al vera revolucio. La germana novembro-revolucio ne estis la elementa eksplodo de revoltanta popolo, kiu decide volas aliigi elprofunde siajn ĝisnunajn vivkondiĉojn; ĝi estis plivere la pereo de sistemo malsukcesinta tute jam dum milito kaj nun devigata eksiĝi sub la venkintaj armiloj de ĝiaj dummilitaj malamikoj. Ne la volo de vekiĝinta popolo, sed la potencordono de l'Ententaj registaroj kaŭzis la renversiĝon de l'imperiestra regado. Tiu fakto estas verdire la tuta tragedio de l'germana revolucio.

Fakte, kion oni povis atendi de revolucio, se la centra organo de l'socialdemokratio, kiŭ ĝis tiam pleje influis la germanan laboristaron kredis sin devigata diri al sia legantaro ankoraŭ l'vesperon antaŭ la revoluciaj novembro-okazintaĵoj ke la germana popolo ne jam maturiĝis por eniri respublikon? Certe ankaŭ vivis aro da agemaj revoluciuloj, sed ili estis tiom malmultnombraj, ke ili ne povis aliigi la staton de l'aferoj. La germana revolucio ne estis la finrezulto el interna dezirego muĝanta kaj bolanta depost jardekoj inter popolo, ĝis kiam finfine ĝi krevigas la malmovajn formojn kaj sukcesas akiri memstaran vivon. Ĝi nur estis finrezulto el malsukcesa milito — la lasta savo — kiu sole povis transkonduki for de estinta pereiĝinta malnova majesteco al paco. Tial de ĝi mankis interna vigleco, kreanta dezirego, kiuj solaj el movado faras revolucion. Do estis neniu alia revolucio, kiu havis tiel terure malmulte da kreantaj iniciativoj kaj kiu kontentiĝis je preskaŭ senescepta imitado de malnovaj modeloj, kiel la germana novembra revolucio en 1918j. (Daŭros.)

---

# Anarkiismo sindikalismo kaj antimilitarismo en Aŭstrio.

De Pierre Ramus.

El "Internationale" esperantigita de Josef Eder, Graz.

Jam delonge la Aŭstra socialista movado sekvis la vojon de la Germana, t. e. ke post mallonga efemera periodo de l'radikala socialdemokrata movado ĉirkaŭ la jaro 1880 ĉitiu — sub influo de germanaj anoj de Kautsky (kaj de aliaj) — transiĝis en la taktikon de l'modera socialdemokrata ideologio marksisma. Konsiderante la malviglajn historiajn evolutendencojn de socialista kvalito, kiuj ekzistis en Aŭstrio kaj konsiderante la ektimigan efikon de diversaj tiutempaj atencoj kaj perfortoj plenumitaj de l'radikala movado, estis nature, ke la laborista movado eniĝis la socialdemokration kaj ties centralisman sindikatan movadon. Da anarkiistoj, — ankaŭ tiuj sin taksintaj tiel, kaj ankaŭ fakte valoraj agantoj — malaperis dum tiu tempo, ĝis 1907 kiam en Wien estis fondita la "Wohlstand für alle". Sed kvankam estis grava afero por la tiam malgranda movado de l'komunista anarkiismo kaj de l'revoluciema sindikalismo, organizita sub la titolo: "Ĝenerala sindikata federacio de Austrio", ke la movado povis memstari kaj aperigadi sian propran organon kun eldonkvanto da 1500—2000 ekzempleroj (en la tiama teritorie granda Aŭstrio-Hungario), tamen al ĝi ne estis eble, kontraŭagi la povon de l'socialdemokratio, tiu ĉi gvidis senlime la Aŭstrian proletaron kaj precipe estiĝis rapide granda parlamentara partio — karikaturo de l'socialismo — post en 1905 garantiita ĝenerala, egala kaj senpera voĉdonrajto.

Neniaj promesoj faritaj de l'socialdemokratio tiutempe al la proletaro estas plenumitaj. La rezulto de ĝia agado estis al tiu de l'Germania movado simila, t. e. konfido de l'proletaro al la dinastio por ties militistaj celoj en 1914. Eble oni devas taksi pli hontindan la konfidon de l'Aŭstra ol tiun de l'Germana, ĉar sekve de la arbitra kaj despota disigo de l'parlamento ĉi tiu estus havinta la eblon, kontraŭagi la mondan militon je ĝia komenco kiel konscia falsigo de l'popola volo.

Sed la Aŭstria movado agis tiel, kiel sia tiutempa gvidanto d-ro Viktor Adler deklaris en la "Internacia socialista oficejo" en Brüssel — laŭ diro de sia filo Frederiko antaŭ la juĝejo: "La Aŭstria socialdemokratio faros nenion kontraŭ la mobilizo kaj la jam proklamita milito!" Historie ĝi estas tiom pli grava, ke jam en jaro 1909, en Zürich, la verkanto de tiuj linioj profetis dum antimilitarista parolado, ke la Aŭstria socialdemokratio tiel agos en grava okazo. Tiam Frederiko Adler ĉeestanta la paroladon neis la eblon ke lia partio tiel agu. Ni jam spertis, kiu estis prava.

Dum tiu soc. dem. kaj marksisma regado super la Aŭstria laborista movado nature povis ekzisti nur grupeta sendependa, memstara, revolucieme sindikalisma movado de l'sindikalismo en Aŭstrio antaŭ la milito. Tiu movado oftege kuniĝis tiun de l'kommunisma anarkiismo, pri kiu oni povas certigi, ke antaŭ la milito ĝi estis identa al la kolektiva revoluciema sindikalismo estinta ĉi tie. La progapando kaj agitado estis precipe sindikalisme revoluciiga, konsiderante sindikalismon precipe kiel organizon de l'ĝeneralstriko, kaj rilate la aktualajn interesojn de l'proletaro ankaŭ kiel faktoron de l'militservrifuzo en ekonomie produktiva sfero kontraŭ ebla milito. Kiajn konsekvencojn la kontraŭbatalo de tiu movado flanke de l'socialdemokratio havis por la Aŭstra proletaro, scias hodiaŭ ĉiu objektive juĝanta homo. La historio mem juĝis pri la socialdemokratio de Aŭstrio kaj la proletaro devis penti, suferegi pro tio, ke ĝi estis malinstigita de la marksismo, praktike kleriĝi pri l'anarkiismo kaj la revoluciema sindikalismo.

Bedaŭrinde ankaŭ la dummilitaj spertoj teruregaj ankoraŭ tute ne instigis la Aŭstrian proletaron, ekkoni la soc. dem. kaj pense venki ĝin. Tiaj precipe estas la du faktoroj kunagintaj kies efiko estas ke la Aŭstra laboristaro ankoraŭ nun tute malkapablas sin sociale liberigi, kaj rajtas sin nomi revoluciema laborista movado.

Ruze asimiligante sin al la senpensemo kaj neagemo de l'mezkvalita homo la soc. dem. tute malzorgis propagandi, eĉ iomete, inter la proletaro la grandan ideon de l'socialismo; eĉ ne laŭ soc. dem. vidpunkto. La amason ili instigis al pripenso de la plej bagatelaj kaj memtrompigaj moment- kaj taginteresoj, pro kio ĝia spirita vivo restis dormanta kaj ne evoluis al la pristudo de l'taskoj de socialismo kaj sociala revolucio. La sindikatoj ekzistis kaj ankoraŭ ekzistas por la ordigo de ekonomiaj konfliktoj inter kapitalo kaj laboro, tute ne por ke ili revoluciigu. La ceteraĵo estas infektita per parlamentarismo kaj la balotpolitiko socialdemokrata, ne lasas spacon por alia agado. Eĉ kiam ĉi tiu paŝas ŝajne ekonomiajn vojojn, ekzemple antaŭ pli ol unu jaro per fondo de l'tiel nomata "Arbeiterbank" (laborista banko), oni ja ne supozu, ke tiu signifas postan efektivigon de Proudhon-aj pensoj. Fakte la laborista banko ja estas flankenirigita kaj kiel en multaj aliaj okazoj la Aŭstria socialdemokratio foriĝas de praktika uzado de l'marksismo, do nur por uzi Proudhon-an ideon fuŝe, t. e. plene burĝigite.

---

**Ĉiu kamarado varbu almenaŭ unu abonanton.**

Plua faktoro malantaŭen ĵetinta la movadon de l'Aŭstra proletaro estas la bolŝevismo, resp. pseŭdokomunismo. Kiam la amasoj da kolerigitaj, malsatantaj kaj malesperaj soldatoj revenis el la tranĉearo kaj ke per dinasta kabineteraro mem kaŭzigita disiĝo de l'malnova Aŭstria ŝtata naciligo okazis la ĝenerala disiĝo de l'estinta monarkio, tiam ĉi tiuj amasoj malsatis kaj soifis ne nur je natura pano, sed ankaŭ je spirita nutraĵo kaj novorientiĝo. Helppetante ili sin turnis al siaj gvidantoj. Ili posedis ne nur la materialan, sed ankaŭ la militistan potencon en siaj manoj; ĉar ili estis armitaj.

(Daŭrigo kaj fino en venonta n-ro.)

# La Ĝenerala laborista unio (Unuec-Organizaĵo) Germana.

## I. La revolucia laborista movado dum la milito (1914—1918).

La Ĝenerala Laborista Unio (Unuec-Organizaĵo), mallongigite A. A. U. E., estas parto de tiu revolucia laborista movado de postmilita tempo en Germanio, kiun oni nomas la uniisman movadon aŭ la uzin-organizan movadon. Unio signifas uniĝon. En Romanaj aŭ Latinaj landoj ankaŭ la kuniĝo de sindikatoj kaj meti-unuiĝoj ofte estas nomata unio (Francio, Italio ktp.). Tiu fakto povus kredigi ke A. A. U. E. egalas aŭ similas ankaŭ en sia organiza konstruo la sindikatismajn uniojn alilandajn. Sed ni vidos, ke la uniisma movado Germania, kaj speciale la A. A. U. E., reprepentas tute novan formon de laborista organizado.

Antaŭmilite ekzistis en Germanio krom la negravaj kristanaj kaj Hirsch (elp.hirŝ)-Dunker-aj meti-unuiĝoj la grandaj centralismaj "Liberaj Metiunuiĝoj", kiuj havis kiel ĉefaron la "Ĝeneralan Komisionon de la Liberaj Metiunuiĝoj". Hodiaŭ la kuniĝo de tiuj metiunuiĝoj estas nomata "Ĝenerala Germana Metiunuiĝ-Asocio" (A. D. G. B.). La unuopaj metiunuiĝoj, kiuj estas severe centralizitaj, estas plej parte profesiaj unuiĝoj, nur en kelkaj industrioj oni progresis ĝis industri-unuiĝoj (metalista, konstruista, trafikista asocioj). Mi ne preterlasu mencii, ke ankaŭ jam antaŭmilite federismaj metiunuiĝoj ekzistis, sed tiam estis sufiĉe negravaj kaj ekzakte egalis la centralismajn Liberajn Metiunuiĝojn bazigante la organizan konstruon sur profesia aparteno. Tiuj federismaj metiunuiĝoj nomis sin "Libera Asocio de Germanaj Metiunuiĝoj", kaj el tiu asocio devenas la nuntempa "Libera Laborista Unio Germania (Anarki-Sindikatanoj)". Hodiaŭ tiu organizaĵo, kiu aliĝis al I. A. A., havas plian gravecon ol sia antaŭmilita antaŭulo.

En tempo de malrapide evoluanta kapatalismo la profesiaj asocioj ja havis certan gravecon. Sed ili perdis ĝin, kiam per kreskanta kuncentrigo de l'kapitalo ankaŭ la batalkondiĉoj de la laborista klaso tute aliiĝis. Jam antaŭmilite tiu fakto dum diversaj grandaj ekonomiaj luktoj evidentiĝis. Ni prenu praktikan ekzemplon, la ŝipkonstruan industrion, kiu jam antaŭ la milito estis plej altgrade kuncentrigita! Maldungego (lokaŭto), striko sur la ŝipkonstruejoj partoprenigis la batalon ne nur unu certan grupon, sed la plej diversajn. Ĉar sur la ŝipkonstruejoj ne nur ŝipkonstruisoj laboris. Ĉiuj profesiaj grupoj interrilatis nome metalistoj, elektristoj, ĉarpentistoj, selistoj, tapetistoj, dekoraciistoj ktp. Kiun sencon havis tiacirkonstance aparta organizaĵo de unuopaj profesioj? Sed plue: la batalo tiam ne jam restis kiel pli frue limigita ĉe nur unu uzino, nur unu ŝipkonstruejo. Ĝi etendiĝis sur la tutan industrion (en tiu okazo ŝipkonstru-industrion) aŭ almenaŭ sur ties grandan parton kaj eĉ enkalkulis kelkajn rilatajn industriojn. Metiaj strikoj kondukis al industriaj strikoj kaj industrigrupaj strikoj.

*La epoko de la kuncentrigita kapitalo kreis la proletaran amasan batalon.* Kaj por plenumi la postulojn de amasa batalo la potenco de la profesiaj asocioj ne plu sufiĉis. Oni devis trovi novan formon de organizado adaptitan al novaj pridiritaj cirkonstancoj. Tiu fakto la proletaron devigis pripensi la plej bonan kaj pli laŭcelan formon por ĝiaj batal-organizaĵoj. Tiu esploro kaj laborado pri nova formo de organizado estis vigle helpata per la dummilite ekestinta milit-industrio. Gigantaj amasoj da laboristoj de ĉiuprofesiaj estis kunigataj en la armilkaj municifabrikoj, en la vestaĵo- kaj nutraĵo-farejoj, laborantaj ĉiuj por la sama celo: havigi novan nutraĵon al la milita bestaĉo. Longa labortempo, kolosa ekspluatado kaj fine ankaŭ nesufiĉa nutrado kreis bazon ĉiam plilarĝiĝantan por la malkontento de la laborista klaso. Tiu malkontento sin direktis ne nur konstraŭ la ekspluatantoj mem, la fabrikistoj kaj entreprenistoj, sed sur politika grundo ankaŭ kontraŭ la militista aŭtokratio generala kaj registara. Inter la politike kaj metiunuiĝe organizitaj laboristaj naskiĝis opozicio kontraŭ la partikaj metiunuiĝ-instancoj, kiuj konsentis kun la registaro por la milito. Kaj tiu opozicia parto de la laboristoj mem precipe akcelis la esploron de nova formo de proletara batal-organizo.

Jam en aŭtuno 1914 fondiĝis la Spartakus-grupo, kiu, gvidata de Karl Liebknecht kaj Rosa Luxemburg, faris efikan agiton kontraŭ la milito kaj por la proletara ribelo. En Junio 1916 aperis la unua numero de la "Laborista Politiko", redaktita de Johann Knief en Bremen, semajna revuo eldonita de la Bremen-a grupo de maldekstraj radikaluloj, kiu aperis laŭleĝe dum la tuta milito kaj kiu meritas rilate la ideojn la unuan rangon en historio de l' revolucia movado en Germanio. Krome ekzistis diversaj grupoj opoziciantaj kontraŭ la registara politiko kaj la oficiala socialdemokratio. Mi nomas ankoraŭ la I. S. D-on. (Internaciaj Socialistoj de Germanio) gvidata de Julian Borchardt kaj ilian informilon "Lichtstrahlen" (lumradioj). Ne forgesinda estas la "Sozialdemokratische Arbeitsgemeinschaft" (Socialdemokrata Labor-komunumo), kiu stariĝis en 1917 kiel Sendependa Socialdemokrata Partio kaj kiu estis gvidata de Ledebour kaj Adolf Hoffmann. Sed tiu organizaĵo ne havas gravecon rilate la kreadon de nova organizformo, ĉar ĝi estis nur kopio de la malnova Socialdemokrata Partio de Germanio krom diference de tiu ĉi ĝi estis pacifista (Bernstein) kaj nur kondiĉe rifuzis la defendon de la regno (Ledebour). Tia estis la *politika* konstelacio en la revolucia movado de Germanio dum la miltio. Mi devis tion ekcenti, ĉar en la politikaj organizaĵoj agis la plej aktiva parto de la revoluciaj batalantoj kaj al la laboro en la tute sozial-patriotaj metiunuiĝoj ili plejofte ne atribuis grandan valoron. La Spartakus-grupo ja faris tre trafan kritikon pri la metiunuiĝoj kaj propagandis revoluciigon, sed ĝi ne kapablis decidi pri ĝisfunda alistarigo sur ekonomi-politika bazo, kian jam postulis la tiamaj produktad-kondiĉoj. Nur en la "Arbeiterpolitik" (Laborista Politiko), informilo de la Bremen-aj maldekstraj radikaluloj, jam tiam estis diskutata la problemo de ekonomipolitika unuec-organizo. Kaj la en Januaro 1918 komenciĝintaj amasaj strikoj en armilar-industrio vere pruvis, ke sen nova bazo sukcesplenaj bataloj de la laborista klaso ne plu povas esti farataj. Oni kreis antaŭ kaj dum la Januara striko lauce-

**Abunde donacu monon por „Libera Laboristo". Jen gravega helpo al liberecana movado.**

lan oficon nome "revolucia reprezentanto" (Revolutionäre Obleute). La laborantaro de ĉiu uzino elektis el si reprezentantojn, kiuj kunvenis kun la reprezentantoj de l'ceteraj uzinoj en reprezentanta kunveno (laborista konsilantaro); ili konferencis kaj gvidis la strikon. La reprezentantoj ne estis balotataj pro partia aneco, sed ilia revoluciema agado en la uzino decidis. Kaj la reprezentanto ne reprezentis unu profesion, sed la tutan laborantaron de la uzino. Li ne pledis pro malgrandaj ekonomiaj postuloj, ne, nur pli gravaj celoj estis pritraktataj: akiro de la paco, revolucio! Estis la ekonomi-politika ĝenerala striko, kiu devas esti la signalvorto en la ekonomi-politika unuecorganizo; ĝi kunigas la proletaron kiel klason, ĝi ne diferencigas inter diversaj profesioj, inter lernintaj kaj ne-lernintaj laboristoj. Kaj tiu nova formo de klasbatala organizo, konstruita sur la sistemo de revoluciaj reprezentantoj montriĝis unuafoje dum la Januarstriko en la jaro 1918. Sed tiu formo ankaŭ devis esti bazo por la poste fondita Universala Laborista Unio. Pri la plua evoluo kaj la fondado de unioj temos la sekvontaj artikoloj.

Daŭrigota.

"Ino" (Internacia Informservo) de la "Ĝenerala Laborista Unio (Unnecorganizaĵo) Germana".

---

## Post la respublikestra baloto en Germanujo.

La balotbatalo pasis. Hindenburg, la reprezentanto de la militarismo Wilhelm-a, fine estas komisiiĝinta kiel "Reichspräsident", do kiel "gardisto de la Weimar-a konstitucio" per la helpo de la "Socialdemokrata Partio Germana" (S. P. D.). Ne estas necese diri, ke la elekto de Hindenburg estas triumfo de la militarisma kaj kapitalisma klaso, kiu kondutas pli kaj pli aroge kaj cinike. Ĉiu eksterlanda laboristo eble serĉas la kaŭzojn de tiu balotrezulto kaj demandas, ĉu la laboristaro voĉdonis por Hindenburg, aŭ ĉu ĝi restis distance de la voĉdonado. Ni devas konfesi, ke tio faktis anbaŭ. Sed al tiu laboristara parto, kiu voĉdonis por Hindenburg estis egale, ĉu venkus Hindenburg aŭ Marx. Ĝi pensis, ke la stato de la laborista klaso ne pliboniĝus, nek per la regado de Hindenburg, nek per la knuto de Marx. Ĝi do, ne sciinte kial, balotis Hindenburg. Same ĝi povus esti balotinta Marx, sed ne konscie konfidanta al unu aŭ alia.

La venko de Hindenburg sendube estas la rezultaĵo de la kondamninda "edukado" per partioj kaj reformistaj profesiaj organizaĵoj (Gewerkschaften). Ankaŭ la venko povis veni per la efiko de la "glora" politiko dumsesjara de la respublika registaro tutgermana, kiu havis la du plej bonajn helpantojn, la mortinta reĝprezidanto Fritz Ebert kaj la "Socialdemokrata Parito Germana". Krome, granda parto de la laboristaro, germana ĝis nun ne forĵetis la nacionalismon. La nacionalismo ankoraŭ ne foriĝis el la kapoj de la laboristoj, ĉar la partiaj kaj sindikataj gvidistoj pensas kaj agas anstataŭ la laboristoj mem. La "Socialdemokrata Partio Germana", kiu de 1914 konsentis al la diro de Wilhelm Hohenzollern: "Mi ne plu konas partiojn, sed nur Germanojn" karakterizis sin malkaŝe kiel nacia kaj perfidema. Dum kvar jaroj ĝi liveris al Hindenburg laboristamasojn kiel porkanona "nutraĵo" kaj nuntempe la elektulaĉaron. Ni nur memorigas al la konsentado de la militkreditoj per la Socialdemokrata Prartio Germana kaj al la grandaj helpservoj por la kapitalistaro dum ses jaroj. Tio jam sufiĉe pruvas kontraŭ la liverinto de "kanona nutraĵo",precipe ĉar tiu ĉi "laborista partio" mem sufiĉe prizorgis, ke la en- kaj eksterlanda laboristaro ĝin facile ekkonas kiel laboristmalamikan.

La revoluciuloj, eksterlandaj eble demandas, kial la "Socialdemokrata Partio Germ." ankoraŭ havas la influon al la balotantoj, do al la proletaro, malgraŭ sia strangeco. La kaŭzo estas la parti-edukado kaj la konata fortgesemo politika de la germana laboristo. Tro rapide la germana laboristaro forgesis, kiujn oferojn je sango kaj havaĵo ĝi perdis depost 1918. Estas forgesita la "Blanka Gvardio" (kontraŭrevolucia soldataro) kaj ties kruela proletmurdado dum la tempo de la München-a sovjet-respubliko; estas forgesita la Mez-germanlanda ribelo kaj kiel kontraŭaĵo la Kapp- kaj Hitler-ribelprovo; estas forgesitaj la multaj malliberuloj politikaj, kiuj ankoraŭ hodiaŭ estas en malliberejoj, kie ili devas toleri senŝirmate ĉiujn turmentojn de doloregantoj reakciaj!

La germanaj laboristoj rilate al la revolucio iĝis apatiaj; ili ne plu kredas al ribelo revolucia kaj liberigo de la proletaro el la marĉo de la kapitalista sociordo. Sed ne nur la perfidema "Socialdemokrata Partio Germ" kaŭzis la apation de la germanaj laboristoj, sed ankaŭ la "Komunista Partio Germ.", kiu per sia sensenca taktiko, ribelprova (München-a Sovjet-respubliko, Mezgermanlanda kaj Hamburga ribelo certe ne ĝuste akiris la simpatiojn de la germana kaj eksterlanda proletaro, male, pli eble ĝi perdis ĝin.

Same la "Kom. Partio" estas — krom la Socialdem. Partio, kiu pro sia burĝa, kontraŭrevolucia konduto ne estu pritraktata — netaŭga por venkigi la revolucion, pro sia centralismo kaj sklava disciplino, kiu laŭ opinio de la "komunistoj" estas necesa por la fina revolucio. Revolucio nur sur antiaŭtoritata bazo garantias al la homaro veran liberecon kaj pacon. Estas la devo de la antiaŭtoritataj grupoj, revoluciaj klarigi al la proletaro, kiel estas realigebla tia revolucio. Tiam tre baldaŭ malaperos Hindenburg kun lia nelacigebla helpanto: la "Socialdem. Partio Germ.", se ĉiu plenumos sian devon.

per "Ino".

---

## La IIa kongreso de Internacia Laborist-Asocio.

La revolucia sindikalismo en ĉiuj landoj malgraŭ la reganta reakcio kaj spite al siaj kontraŭemuloj ne estas venkita, eĉ ĝi esperige progresis. Ĉiu senpartieca observanto je la IIa kongreso de I. L. A., Amsterdam, 21.—28. de marto, tion povis konstati. La kungrupiĝo de la liberecema revoluciema laboristaro sub la flago de antiaŭtoritataj ekonomibatal-organizaĵoj ekceptis stabilecan formon. I. L. A. dum dujara agado pruvis, ke ĝi estas ekzistkapabla, ke ĝi en estonto defendos nian pozicion sukcese.

Kiel sukceso de I. L. A. devas esti konstatata la unuigo de la revol. sindikalistoj de ĉiuj lando, kiuj ĝuste pro la ekzisto de I. L. A. povis kontraŭagi la klopodojn de la Moskvaj politikemuloj por ensorbi la rev. sindikalismon. Dank' al I. L. A. la antiaŭtoritata socialismo en ĉiuj landoj konservis sian karakteron. En ĉiuj landoj, kiuj estas premataj sub la reakcio, estis I. L. A., kiu ĉiam denove kuraĝigis la persekutatajn porrevoluciajn batalantojn kaj donis al ili certecon, ke la ideoj, por kiuj ili batalas kaj suferadis, estas simpatiaj al centmiloj kaj milionoj da ekspluatatoj en la tuta mondo. Esti barinta la antaŭenmarŝon de l'despota ŝtatkomunismo kaj esti defendinta la ideojn de la Ia Internacio, tio estas la ambaŭ nerefuteblaj sukcesoj de I. L. A. dum ĝia dujara ekzistado.

Estis signo de la klara kompreno pri la internacia situo de l'rev. sindikalismo, ke la unua grava punkto de l'tagordo de la IIa kongreso de I. L. A. traktis la pozicion de l'revolucia sindikalismo rilate al la diversaj politikaj partioj kaj post tio la batalon kontraŭ la internacia reakcio.

---

**Provizu la redaktorojn je valora interesa materialo kaj via varbado por „L. L." faciliĝas.**

La referaĵon pri la pozicio de l'revol. sindikalismo rilate al la diversaj politikaj partioj traktis Rudolf Rocker. En la rezolucio en sekvo de ĉi referaĵo tekstas ke

"nur la ekonomiorganizaĵoj de l'proletariaro kapablas batali por ekonomiaj akiraĵoj en la nuna socio kaj efektivigi ilin; ke nur la revoluciemaj antiaŭtoritataj laboristorganizaĵoj prezentas la solan laŭnaturan kaj veran formon, kiu kapablas entrepreni la batalon por la reorganizo de l'ekonomia kaj socia vivo sur la bazo de l'libereca komunismo; ke la politikaj partioj, kiu ajn estas iliaj nomoj, neniam povas esti konsiderataj kiel la fermenta forto de l'ekonomia reorganizo, ĉar ilia agado senescepte estas direktata al akiro de ŝtatpotenco, kaj ke unu el la ĉefceloj de la laboristmovado ne povas esti la akiro de ĉi potenco, sed kontraŭe la izoligo de ĉiuj centralismaj organizaĵoj en la socio, kiuj alcelas la regopotencon, ĉar la sendependeco de la laboristmovado estas nelasebla kondiĉo sur la vojo de ĝia fincelo.

La IIa kongreso de I. L. A. opinias, ke ĉia unuigo aŭtoritata kun la lobristsindikatoj neeviteble forfremdigas la laboristklason de ĝiaj originalaj taskoj kaj celoj kaj ke pro ĉi kaŭzo estas malutila ĉia koalicio inter la laboristsindikatoj kaj la partipolitikaj organizaĵoj.

La kongreso refutas la trompan komprenon pri samspececo de partioj, kiuj celas, akiri la politikan potencon, kun ideanaj grupoj, kiuj ekster ĉiu ŝtata kaj aŭtoritata principo agas por la sociala transformigo.

Konsiderante la situacion, kiu estas danĝeroplena por la laboristklaso de ĉiuj landoj, la kongreso IIa de I. L. A. opinias, ke estas devo de la revoluciemaj sindikalistoj de ĉiuj landoj,

pli energie ol iam ajn daŭrigi la varbadon por la sindikalismo sur la bazo de la principoj, kiujn entenas la statuto de I. L. A.,

ne partopreni iun unuigokomedion, kiu estas entreprenata de tiuj, ki subpremas la laboristmovadon kaj volas fari ĝin rabaĵo de iaj politikaj partioj;

konstrui I. L. A.-on kiel kolektujon de ĉiuj revoluciemaj kontraŭŝtataj sindikatfortoj de l'tutmondo."

En la rezolucio pri la batalo kontraŭ la internacia reakcio la kongreso kontraŭas la malĝustan komprenon pri la tielnomataj burĝaj liberoj, kiuj prave estas akceptataj de kelkiu revoluciemulo. Kontraŭe al la ignoro de tiaj liberoj la kongreso konsideras tre havindaj la elementan presliberecon, liberecon de l'parolo kaj koalicio por la bataloj laboristaj. Ĉi liberoj estas la rezulto de pasintaj revolucioj kaj la defendo aŭ reakiro de ili estas varme rekomendata al la proletariaro. Krome al la proletariaro estas rekomendate, konservi ĝian fidon al la klasbatalo, precipe en tiuj landoj, kiuj estas trafitaj de la furiozo de l'diktaturo kaj kie la sindikataj organizaĵoj ne povas regule funkcii. Kungrupigo en la laborejo estas speciale rekomendata en la lastenomitaj okazoj.

La kongreso ankaŭ prikonsideris la praktikajn ĉiutagajn batalojn en la ekzistanta sociordo. Ĝi deklaras kiel celon la detruon de l'ŝtato kaj la forigon de l'salajrosistemo, sed ankaŭ ĝi alvokas la laboristojn, batali en la kapitalisma socio por akiro de pli bonaj vivkondiĉoj, ĉar ĉi batal havas eminentan signifon por levo de la vivonivelo kaj por la disvolvo de la revolucia iniciativo de la laboristaro. La forigo de senlaboreco, la alidirektigo de l'produktado por la bezonoj de l'popolo, la altigo de la laborsalajroj kaj la mallongigo de la labortempo ĝis akiro de l'seshora labortago estas deklaritaj kiel postuloj en ĉi rezolucio.

Por povi gvidi la praktikajn ĉiu-tagajn batalojn sur tiu kampo, kie ili okazas, la kongreso decidis akceli la formiĝon de internaciaj industri-federacioj. Ĉe strikoj aŭ lokaŭtoj en iu industrio la revoluciemaj sindikalistoj havas la taskon, instigi la samindustrianojn de l'aliaj landoj al solidaragoj. Por prepari ĉi agokampon, la kongreso decidis, starigi komence tri internaciajn sekretariarojn, nome por la maristoj per la federacio de l'maristoj, interne de la sindikalisma sindikatunio de Nederlando (N. S. V.); por la konstrulaboristfederacio de l' C. G. T. de Portugalo; kaj por la metallaboristoj per la metalindustrilaborista federacio de F. A. U. D. en Germanio. La formigon de pluaj tiaj internaciaj industrisekretariaroj la sekretariaro de I. L. A. akcelu laueble.

Ankaŭ la demando pri la gejunularo en la laboristmovado estis prikonsiderata. Por varbi la gejunularon por la libereca laboristmovado kaj por la sindikalismo estis rekomendate al la aniĝintaj landaj organizaĵoj aranĝi lernejojn por la junularo, eldoni librojn kaj broŝurojn precipe por la junularo, eltiri ĝin el sportfanatikeco, akceli la fondon de junulara movado en landoj kie tia ne jam ekzistas kaj unugi la junularon trans la limoj per internaciaj konferencoj.

La Dawes-traktato ankaŭ estis objekto de kongresdebatoj. Post detalaj kaj esploraj diskutado kaj parolado de deligitoj el pluraj landoj okazis interkonsento je komuna rezolucio, en kiu Dawestraktato estas deklarata kiel venena fonto de ñovaj ekonomiaj konfliktoj el kiuj ĉiutempe povas rezulti nova milito. Estas konstatate, ke krom la subelĉerpo de l'germana laboristklaso ankaŭ la proletariaro de ĉiuj aliaj landoj estas subpremota per ĉi fifama projekto; fine estas dirite:

"Fidele al la principoj de l' Ia Internacio la kongreso esprimas la opinion, ke la interesoj de l'internacia proletariaro tute kontraŭas tiujn de l'burĝaro, kaj pro tio nepre rezultiĝas el ĉia nacikomuneco inter la reprezentantoj de l'kapitalismo kaj la laboristaro, kia estas praktikata de la tielnomataj laboristpartioj, nur plena rezigno je la proletaria ideo pri liberigo."

La kongreso alvokis la organizaĵojn aniĝintajn al I. L. A., propagandadi kontraŭ la Dawes-traktaĵo, por informi la laboristaron de ĉiuj landoj pri la danĝero, kiu minacas al ili, kaj alvokis ilin prepari komunajn agitadojn kontraŭ ĝi.

Unu el la demandoj de la tagordo, kiu pro tempomanko ne povis esti traktata, estis la demando pri laborejaj konsilantaroj. La prezentita koncerna rezolucio estis metata al la protokoldokumentoj kaj ĝi estu diskutota en venonta tempo de ĉiuj landaj orgnizaĵoj, por ke je la proksima kongreso la demando estu inde traktebla laŭ ĝia graveco.

Krom ĉi principa kaj taktikaj demandoj estis ankaŭ decidate pri organizaj aferoj. Unuan rangon havas la internacia agado. Por starigi ĝin sur solidan bazon estis decidate, ke ĉiu landa organazaĵo formu internacian poragadan komisionon, en kies manojn estu donataj la praktika organizo okaze de internaciaj agoj. Por ĉi celo la sekretariaro de I. L. A, devas esti informata senpere pri la situacio en ĉiu lando, same kiel ankaŭ la sekretariaro devas informi la respektivajn agokomisionojn. Ĉe urĝaj necesaj agoj internacikarakteraj ĉi internaciaj agokomisionoj laboru kune kun aliaj ne aniĝintaj korporacioj.

La financoj de I. L. A. estis starigataj sur nova bazo. Laŭ ĝi kotizoj por I. L. A. estu pagataj de la membroj mem kaj kolektataj per la lokaj organizaĵoj. La kotizo po membro validas dek amerikaj cendoj au samvaloron en la respektiva landa valuto. La kotizo estu kvitancata per glumarko en la membrolibro de ĉiu membro kaj ĝi estu transdonata de la landaj organizaĵoj al la sekretariaro almenaŭ ĉiutrimonate. El ĉi kotizoj estu uzata triono por internacia solidareco kaj du trionoj por la propagando.

La gazetaro de I. L. A. estu ampleksigota, la gazetarservo estu eldonata ĉiusemajne, la revuo monate en pluraj lingvoj kaj propagandobroŝuroj ankaŭ en pluraj lingvoj.

Krom tio okazis decido, kiu certe altiros la intereson de l'ĉiulanda proletariaro batalanta por libereco:

Estu starigota, internacia studkomisiono, kiu esploru la disvolvon de la tutmonda krizo, kiu pli kaj pli klerigu la proletariaron de ĉiuj landoj pri la praktika solvo de la politikaj kaj ekonomiaj problemoj; kiu eldonu serion da broŝuroj pri la diversaj taskoj de la laboristmovado. La sekretariaro de I. L. A. estas komisiita publikigi ĉi monografaĵojn, ĉu senpere ĉu pere de la landaj organizaĵoj aniĝintaj al I. L. A.

Estas videble el tio, ke la kongreso faris grandan laboron kaj malfermis vastan laborkampon por la internacia laboristmovado. La taskoj de la ekonomiaj batalorganizaĵej de la revoluciema laboristaro pli kaj pli ampleksiĝas; en ĉiuj landoj la sociala revolucio vokas la laboristaron al batalo por la antiaŭtoritata libereca komunismo, por kiu I. L. A. iĝis tutmonda akcelanto.

Tutkompreneble la kaptitaj kaj suferantaj fratoj en ĉiuj landoj ne estis forgesataj kaj per rezolucio estis perataj la salutoj de l'internacia proletariaro al la politikaj persekutatoj kaj kaptitoj, kaj estis alvokata la laboristaro de ĉiuj landoj al batalo por la liberigo de la suferantaj fratoj. Speciale la kongreso primemoris tiujn, kiuj devas suferi pro sia sindonemo al la sociala revolucio en la malliberejoj kaj koncentrejoj de la sovjetregistaro.

IIa kongreso de I. L. A. estis elmontrigo de ĉiuj ĉi fortoj de l'internacia proletariaro, kiuj spite al ĉiaj potenculoj volas faligi la malnovan mondon kaj konstrui novan mondon de libereco kaj bonstato por ĉiuj.

## Salutleteroj de senaŭtoritataj Esperantistoj al la IIa kongreso de Internacia Laborista Asocio en Amsterdam.

I.

Karaj kamaradoj!

Eksciinte, ke inter multaj aliaj kongresaferoj estas demandite ankaŭ pri via pozicio rilate al la internacia helplingvo Esperanto ni opinias grave komuniki al vi kelkajn sciindaĵojn.

Certe jam multaj el vi aŭdis pri la utileco kaj uzebleco de Esperanto, eĉ spertis ilin, dum aliaj inter vi ja ankoraŭ opinias ne povi kredi pri la praktika aplikeblo de mondhelplingvo. Ĉi opinio bazas sin ĉefe sur nesufiĉa kono pri ecoj de la lingvo kaj ĝia jam nun treega disvasteco. Neniel utilus raporti al vi detale pri la uzateco de Esperanto ĉe pastroj, kapitalistoj, radioidiotoj kaj ĉe cetera burĝfiularo, pri la ampleksa esperanta gazetaro, pri tradukita kaj originale verkita literaturo; eĉ konigado al vi pri la disvasteco de Esperanto ĉe laboristoj ĝenerale hodiaŭ ne estas tre grava.

Sufiĉas konstati, ke en niaj vicoj, inter sindikalistoj, anarkiisto kaj aliaj liberemaj fluoj estas Esperanto disvastigita tiom, ke nun povis formiĝi tutmonda organizaĵo de esperantistoj sur bazo liberecana kontraŭautoriateca. Ĉi evoluo al pura tendenca esperanta orgnizaĵo devis okazi tiel ĉe plifortiĝo de l'proletaria Esperantomovado. Ke la komence partipolitike neŭtrala proletaria Esperanto-internacionalo "Sennacieca Asocio Tutmonda" estas diktatorata nun flanke de l'partikomunistoj, tio povis esti nur instigo, sed neniel la kaŭzo de konstituiĝo de "Tutmonda Ligo de Esperantistaj Senŝtatanoj" (TLES.).

Esperanto jam estas disvastigita inter niaj amikoj kaj kamaradoj de l'tuta mondo tiom, ke la sekretariaro de l'Internacia Laborist-Asocio" opiniis necesa ankaŭ esperantan eldonon de l'Internacia Bulteno de I. L. A.; des pli ĉar ĉi esperanta eldono fariĝis bezono tial, ke esperanta lingvo restis sola interkomprenigilo kun la japanaj kamaradoj post arestigo de la tieaj plej aktivaj sciantaj la anglan lingvon kamaradoj. Ankaŭ por interrilatoj kun kamaradoj de tiuj landoj, kie severa cenzuro regas krom l'aliaj teruraj subprempraktikadoj, Esperanto montriĝis ekstreme utila.

En komenca tempo la esperanta eldono de l'Internacia Bulteno povis esti efektivigata nur grandpene, ĉar la tradukantaj kamaradoj (manloboristoj) ne estis lertaj pri skribmaŝino. Nun ankaŭ ĉi malfacilaĵo estas forigita kaj nenio baras la regulan eldonadon.

Laŭ nia opinio esperanta eldono devus esti konstanta organo, ĉar ĝi estas ne malhavebla en tiaj okazoj, kiam la solaj interligantoj en internaciaj rilatoj (la kamardoj kiuj parolas plurajn lingvojn) pro iaj kaŭzoj (arestoj ktp.) foriĝas el la movado kaj ne povas esti tuj anstataŭataj.

Pro la facila lernebleco de l'Esperanto estas ebligate, ke ĉi lingvo enpenetras ĉiujn laboristmediojn kaj ne kondiĉas ian edukitecon. Estus tial via merito rekomendi tre insiste al ĉiuj kamaradoj ĉiulandaj la lernadon kaj aplikadon por niaj klasaj celoj- kaj atentigi konstante en la gazetaro de ĉiuj aliĝintaj al ILA. orgnizaĵoj pri la graveco de ĉi tiu universala interkomprenilo.

Ĝis tiam ki en ĉiu loko, en ĉiu grupo Esperanton sciantaj kamaradoj ekzistas —, akceptu la servoin de l'unua ekzistanta kontraŭaŭtoritateca esperanta organizaĵo TLES., kiuj estos proponataj al vi tre baldaŭ flanke de la sekretarioj ciulandaj!

Rekomendante al vi ĉi diritan al profunda konsiderado, ni deziras plej sincere plenan sukceson por viaj kongreslaboroj!

Kun revolucieca fratsaluto

Berlina grupo de anarki-sindikalistaj Esperantistoj (TLES. — anoj)

Bruno Lewandowski. Bernhard Czeppan. Alfred Jlau. Artur Bolle. Hans Manske.

Berlino, la 13an da marto 1925.

II.

Al la kamaradoj en Internacia Laborista Asocio!

Tro malfrue mi informiĝis, ke la 2a kongreso de ILA. parolos ankaŭ pri la "Pozicio de ILA. al mondhelplingvo Esperanto". Havante praktikajn spertojn en la Esperantomovado mi estas aktiva aganto en "Sennacieca Asocia Tutmonda", apartenas al la inicitiva grupo en "Tutmonda Liga de Esperantistaj Senŝtatanoj?" kaj estas la fondinto de "Internationale Nachrichtenstelle Ost" (Ino) kiu estas certe ankaŭ konata al la sekretario de ILA.-Nachrichtenstelle der AAUE.-kiel jam bone funkcianta. — Ĉi-tion mi notas por pruvi, ke mi ratas aŭdigi mian konsilon. Mi esperas, ke ĝi atingos la kongreson. Estas atentiginde, ke mia propono plej verŝajne estas en interkonsento kun la grupo de la iniciatinto de Tles kaj mi kuraĝas *kvazaŭ en ties nomo* proponi la akcepton de ĉi-sekva resolucio:

"Konsiderante, unuaflanke:

a) Ke la multlingveco baras en sufiĉe alta grado ĉian intensivan internacian laboron kaj precipe la pli intiman interligon, kontaktiĝon kaj reciprokan penetriĝon de la diverslanda kamaradaro;

b) Ke per Esperanto prezentiĝas tre konvena ilo por intensigi la internacian laboron kaj ke la kamaradoj-esperantistoj klopodas servi ĉiel por ke la pli intima kontaktiĝo kaj reciproka penetriĝo realiĝu;

Pro tiuj konsideroj, la kongreso: aprobasla eldonon dela bulteno de ILA en Esperanto kaj akceptas la proponon de la kamaradoj-esp-istoj aperigi en ties baldaŭ aperonta revuo ĉiujn oficialajn publikaĵojn kaj rekomendas al siaj diverslandaj organizaĵoj regule doni raportojn al la sialandaj espistoj por ke ili aperigu la raportojn en la revuo, tiamaniere praktike servontaj laŭ urĝaj bezonoj de ILA.

Konsiderante, duaflanke:

a) ke nur malmultaj, unuopaj Esp-istoj estas samtempe ankaŭ anoj de la landaj organizaĵoj de ILA.;

b) sed ke en preskaŭ ĉiu lando troviĝas kelkaj, kiuj estas pretaj ĉiel servi per tradukado, dokumentizo ktp.;

Pro tiuj konsideroj la kongreso rekomendas al siaj landaj organizaĵoj organizi informejojn t. e. komisii la esp-istajn kamaradojn fari la tradukojn jam cititajn kaj ĉion alian, kio rezultas el la taskoj de informejo.

Konsiderante, triaflanke:

Ke la elekto kaj oficiala alpreno de mondhelplingvo necesigus plej seriozan studon de la tuta problemo, kiu de kongreso ne estas farebla, la kongreso pro tiu motivo simple akceptas la servojn, proponitaj de la Esperantistoj kaj rekomendas lernadi Esperanton de Zamenhof, kiu pruvis sian vivpovecon kaj estas plej disvastigata.

La kongreso notas kun kontento, ke Tles estas preta instigi siajn membrojn ĉiel helpi al ILA.

Kun frateca saluto via

New York, 7. de Marto 1925.

Th. Weder.

---

# El Japanio.

## Du anarkiistoj mortis en japanaj malliberejoj.

La 23an de januaro K. do G. Muraki, kiu estis en malliberejo en Tokio grave malsaniĝis je akuta nefrito. Kontraŭvole la registaro permesis lian eliron kaj li estis portata al Rodo Undo Ŝa, oficejo de japana anarkiistaro sed ĉiuj zorgoj estis vanaj, li mortis la 24an ĉirkaŭate de karaj kamaradoj. De jam 20 jaroj Muraki bataladis en vicoj de anarkiistoj malgraŭ sia ĉiama malsaneco. Konsciante tiun malsanecon li sin mem proponis por revenĝo de E. Osugi kaj klopodis kun kelkaj kamaradoj por tiu-ĉi celo. Li estis arestata en bombofabrikejo sekreta apud Tokio. Pri tiu-ĉi afero registaro ankoraŭ malpermesas la gazetojn raporti.

La 20an de januaro K.-do K. Goto, jam de 5 monatoj en malliberejo pro propagando de anarkiismo en soldatejo, mempendiĝinte mortis. La registaro, ne sciigis la anarkiistajn kamaradojn pri tiu morto, sed lia patrino vizitante la oficejon Rodo Undo Ŝa ilin informis. Tuj ili alkuris al malliberejo kaj sukcesis la 24an ricevi la kadavron por esplori la veron pri kaŭzo de lia morto. Analizo certigis la memvolecon de tiu morto. Cetere en lia ĉelo oni trovis adiaŭan leteron, kiu ne postlasas dubojn. K. do Goto terurigita de la antaŭsignoj de

remalsaniĝo memmortiĝis. Li estis juna poeto kaj propagandis de jam 5 jaroj en tuta Japanio por l'anarkiismo.

La 1an de februaro malfermiĝis funebra kunveno. Tre multaj laborligoj kaj ideoligoj ĉeestis. Kvankam ilia morto devenas fakte de malsaneco la originala kaŭzo estas nuna socia maljusteco. Ĉiuj tion komprenis kaj multnombre alvenis la kondolencaj skribaĵoj.

Ni, japanaj anarkiistoj, ja perdis du ŝatindajn kamaradojn, sed ne malkuraĝiĝis nin ilia foriro!

## Kontraŭstaro je legprojektoj pri laborista movado kaj revolucia movado.

Japana registaro maltimis proponi al parlamenta voĉdono leĝon, kies skizo estas la jena:

Ĉiu ki kontraŭstaros la bazon de l'japana reĝimo t. e. militistaro, parlamento, posedeco k. t. p. estas punata je 10 jaroj da malliberigo. Punataj ankaŭ estos helpo kaj propagando pri tiu kontraŭstaro. Eldono de revoluciaj revuoj estas malpersata. Sindikatoj estas devigataj ŝanĝi la devizon. Samtempe la registaro provas leĝe starigi devigan arbitraciigon laborkonfliktoj kaj sekve laboristoj devos ricevi permeson de polico antaŭ striki.

Tiaj leĝaroj ekstreme indignas la tutan japanan proletaron. Jam lastjare saminspira leĝaro estis proponata sed la popola konstraŭstaro ĝin nuligis. La 11an de februaro okazis en Tokio grava manifestado de sindikatoj kontraŭ la registara iniciato.

Tiuokaze la sindikatoj balotis rezolucion, kiu senmaskigas la registaran konduton. Tiu registaro iaflanke ŝajnas starigi progreseman politikon, sed vere sekvas reakciemajn inspirojn — ruze provas subpremadi laborklason, kaj enŝovi arbitraciadon en labora malpaco —, ŝtelas strikrajton kaj donas ĉiujn armilojn al kapitalistoj en lukto de rebonigo de maljusta labora kondiĉaro kaj liberigo de la laborklaso.

---

# La ruĝa reakcio.

*(El Bulteno de l'Unigita Komitato por la helvo al enkarcerigitaj revoluciuloj en Ruslando.)*

## La tragika procesio.

*Maria Spiridonova ekzilita.*

Kiel jam raportite per nia lasta sciigilo Maria Spiridonova deklaris manĝostrikon, kiel proteston kontraŭ ŝia ekziligo al Siberio. La komunistaj oficoj ignoras ŝian proteston; Spiridonova estis transportata, malgraŭ ŝia malforto kaj elĉerpiĝo, al Samarkand (suda Turkestano). Kune kun ŝi estis ekzilataj al la sama loko ankaŭ ŝia dumviva amikino Aleksandra Ismailowitsch kaj la maldekstra socialrevoluciulo J. Majorov.

Maria Spiridonova, kiu estis kondamnata al morto de la caro, kiu estis turmentata, kiu devis vivadi dum jaroj en Siberia ekzilo, estas nun ankoraŭ persekutata pro sia revoluciema idealismo. Pluraj provoj, de ŝiaj amikoj, ĉe la bolŝevikoj, ke ili donu la permeson por ŝia elvojaĝo al eksterlando, estis nesukcesaj. Nur vekiĝo de la publika konscienco povus devigi la rusan registaron redoni la liberecon al la grave malsana revoluciulino kaj permesi eliron eksterlanden al ŝi.

La bolŝevikoj aplikis novan politikon kontraŭ la politikaj enkarcerigitoj, kies aresttempo estas finita. Anstataŭ esti liberigata la malliberulo estas kondamnata je nova ekziltempo administre (t. e. laŭ ordono de G. P. U. [Ĉeka]) al alia landparto. Por ĉi celo estas elektataj la plej izolaj kaj dezertaj lokoj, kiuj malmulte estas loĝataj kaj malproksimaj centmilojn da mejloj de iu fervojo. La ekziligo al tia loko samsignifas kiel kondamno je absoluta izoligo kaj iom-post-ioma malsatmorto. Nome ekzilito de la registaro ricevas pomonate la "sufiĉegan" sumon da 6 rubloj kaj 25 kopekoj (ĉirkaŭ 3 dolaroj usonaj), kiuj por nura pano apenaŭ suficas. G. P. U. (Ĉeka) malpermesas al ekzilitoj akcepti pagatan okupon, pro timo de infektiĝo de ĉiuj ĉi, kun kiuj ili povus rilati. Ĉimaniere la ekzilata politika punato estas fakte senigita je ĉiaj ekzistorimedoj.

El la grandnombro de la troviĝantaj en niaj manoj dokumentoj, ni ĉi sube publikigas, protestleteron kontraŭ la menciita nova politiko, leteron senditan al la G. P. U., skribitan de E. B. Rubinĉik-Mejer, amiko de de mortinta Petro Kropotkin kaj gvidanto de la eldonejo "Golos Truda" en Moskvo, kiu eldonis la verkojn de Kropotkin, Jean Grave kaj de aliaj anarkiistaj pensuloj.

Al Centroficejo de la politika ŝtatadministracio (O. G. P. U).

Al cefo de la sekret-fako.

Deklaracio de la elekzilita laŭadministre anarkisindikalisto Efraim Borissoviĉ Rubinĉik-Mejer.

Fine de Junio 1924 mia internigo en Susdal-a koncentra malliber-tendaro estis ŝanĝata malsankaŭze en ekziligo al la urbo Tomsk. Antaŭ mia forvojaĝo estis certigate al mi de la respondeca oficisto de la O. G. P. U., civitano Kiel, ke flanke de O. G. P. U. estus farotaj al mi neniaj malfacilaĵoj, en trovo de okupo en Tomsk.

Malgraŭ ĉi kategoria certigo, la loka fako de G. P. U. ĉiufoje kiam prosperis al mi trovi ian okupon, malpermesis al la entreprenistoj, okupi min.

La lasta malpermeso, kiu estis la kvina, estis sendata skribe al mi kaj estis subskribita de la vicgvidanto de Tomska fako de la G. P. U., de civitano Ĉuntonof. (Antaŭ tio estis malpermesate al mi labori ĉe la librejo de la centralaj laboristkooperativoj, ĉe la librovendejo Gubono, en la librejo de la siberia eldonejo kaj en aliaj entreprenoj.)

Kiam mi posedis la nerifuteblan pruvon pri la malhelpoj flanke de G. P. U. kontraŭ okupo de mia persono, mi decidis, lastafoje paroli pri ĉi afero kun la civitano Ĉuntonof. Definitive mi konvinkiĝis, ke oni ne volas doni al mi eblecon fondi ekzistencon.

Ĉar mi ne havas rimedojn por kuracado, mi demandis ĉe la loka G. P. U. ĉu ĝi ebligus al mi trovi senpagan akcepton en iu el la lokaj malsanejoj. Ĝis nun mi ne ricevis respondon.

Ĉar mi ne estas allasata al laboro, mi sendis en rekomendita letero, je 13a de Septembro 1924, deklaracion al la vicgvidantino de la sekretfakto de O. G. P. U., s'ino Andrejeva. Mi ne ricevis respondon, ankaŭ la loka G. P. U. ne ricevis ordonon rilatan al tio.

Mi nun troviĝas en tia situacio, ke mi ne plu havas eblecon kuraci mian malsanon. Male, mi estas kondamnita al morto pro malsato.

Plej akre protestante kontraŭ tia taktiko de la O. G. P. U., mi persistas peti, ke oni donu la eblecon al mi, iri eksterlanden, por trovi kuracadon.

Efraim Borissoviĉ Rubinĉik-Mejer
membro de la anarkisindikalista Unio "Golos Truda".
Tomsk, 8an de decembro 1924.

*La Afero Aron Baron.*

Ekzilita de la caro al Siberio, forkuris Amerikon kaj tie partoprenis aktive la revolucian laboristmovadon. En 1917a jaro li reiris Ruslandon por tie helpi. Li iĝis en Ukraino unu el la plej popularaj verkistoj kaj oratoroj. En 1920 Baron estis arestata de la bolŝevikoj kune kun granda nombro de aliaj delegitoj de Ĥarkov-a anarkiista kongreso, kiu estis okazonta je scio, sen malpermeso antaŭa de la oficistoj.

Baron, same kiel arestitaj samokaze liaj amikoj Ivan Ĉarin, Lea Gottmann, Mikael Birulin, L. Lebedef kaj aliaj, estis ĵetataj jen en tiun, jen en ĉi tiun karceron malgrau ke oni ne lin estus akuzantaj pro iu definita krimo. Iliaj arestoj en Moskvo, Orel, Ĥarkow kaj en aliaj urboj estis kaŭzo de manĝostrikoj de Baron, kiu daŭris sume 50 tagojn.

Nun, post dujara mallibereco sur Solovjecki-insuloj, Baron esperis ricevi la liberecon, almenaŭ por tempo, kiu sufiĉus por reordigi lian rompitan sanon. Sed, letero, ricevita antaŭ nelonge, sciigis nin, ke nun la registaro akuzas lin, "ke li ekscitis la eksterlandan publikan opinion kontraŭ sia aresto sur la Solovjecki-insuloj, kaj ke li decidigis la revoluciulojn, vizitantaj Ruslandon, agadi por lia liberigo."

---

**Viaj laboro kaj kritiko: ambaŭ estas bonvenaj.**

Ĉi akuzo sendube estas motivata de la afablaj klopodoj de John Turner, membro de la brita laboristdelegitaro, por Aron Baron, laŭ petoj de la Unuigita Komitato. Baron estas nun "laŭetape" (malrapida vojaĝo de haltejo al haltejo ĝis celo) transportita al la malliberejo Novonikolajewsk kaj de tie al Altai, Siberio.

Similan sorton suferis ankaŭ kelkaj aliaj kaptitoj, kies tenado sur la Solovjecki-insuloj estis finita. Ĉi politiko nun estas uzata en la tuta lando. Maldekstra Socialrevoluciulo N. Prokopowiĉ post fino de sia ekziltempo en Troitzk nun estis ekzilata al Tobolsk (nordokcidenta Siberio. L. C. Lockermann estis kondamnata al trijara izola karcero en Susdala koncentriga tendaro. A. J. Ihuzavlev, elektristo, samdaŭre estis ekzilata al Siberio kaj nun sendata al Novonikolojevsk sub kontrolo de G. P. U. (Ĉeka). La maldekstraj socialrevoluciuloj Nestrojev kaj Tsipina estis kondamnataj je trijara malliberecо sur Solovjecki-insuloj. Nataŝa Kuznetzova (dekstra socialrevoluciulino) ankaŭ estis kondamnata al trijaro sur Solovjecki-insuloj; sorto de Eugenia Valdinas (maldekstra Soc. Rev.) arestita antaŭ ne longe en Petrograd, restis sekreto.

*David Kogan kaj Ivan Aĥtirski.*

Fine estas konate pri la sorto de ĉi tiuj kamaradoj. Kiou eble remenoras niaj legantoj, ni plurfoje menciis ambaŭ politikajn arestitojn, kiuj depost arestiĝo en 1922 tute malaperis. Ĉiuj provoj, ricevi sciigojn de la rusa registaro pri ili, estis vanaj. Oficiala letero de Internacia Laborista Asocio, demandanta pri loko de ambaŭ enkarcerigitoj, estis nerespondata.

Nun ni el fidinda deveno eksciis, ke David Kogan kaj Ivan Aĥtirski jam antaŭ longa tempo estas mortigitaj de la bolŝevikoj. La ekzekuto estas unu el la plej malkuraĝaj krimoj de la komunistoj. Ambaŭ k'doj estis idealistoj plej noblaj. Kogan estis eksterordinare bela persono, kies altmorala karaktero kaj simpatia konduto kaŭzis ĉe vastaj medioj lian nomigon "malgranda kristo".

*Lasareviĉ ankoraŭ en malliberejo.*

La afero Lasareviĉ meritas specialan atenton. Li estis interpretisto oficanta ĉe Komintern. Antaŭ sep monatoj li estis arestata. Lia sola krimo estas, ke li ricevis el eksterlando sindikalisman literaturon, kiun li legis foje kun kelkaj amikoj. Lasareviĉ apartenas al tiuj, kiuj simpatias al la bolŝevikoj kaj ankoraŭ esperas, ke estus eble por sinceraj revoluciuloj, kunlabori kun ili. Multaj komunistoj ĉe Komintern tre estimas lin, sed neniu el ili riskis diri ion por li favoran.

*La politika izolejo en Ĉeljabinsk.*

G. D. Kuĉin-Oranski, distingiĝinta menŝeviko, kiu dum la malnova reĝimo plurfoje estis en malliberejo, nun estas kondamnita de la bolŝevikoj je dekjara aresto en Ĉeljabinska malliberejo. Laŭ ordono de G. P. U. "en plena izoleco", kio signifas, ke li venos en la timatan politikan izolejon de Ĉeljabinsk.

Izolejo aranĝita en Majo 1923 estas uzata speciale por revoluciuloj, kiuj estas kondamnitaj je longdaŭra karcero kun izoligo. Ĝi ankaŭ enhavas ĉelojn por pluraj personoj, kiuj estas enkarcerigitaj tien, se la kompartio konsidiras neutile pro politikaj kaŭzoj, teni ilin en aliaj malliberejoj de Sovjetrusio. La politika izolejo troviĝas en la konstruaĵo por unuopaj arestitoj de la malnova cara punlaborejo. La konstruaĵo ne nur estas izolata de la ekstero, sed ankaŭ de la aliaj partoj de la malliberejo. La traktado estas eksterordinare severa. Silento estas daŭra, nenia laboro estas permesata. La izolejo estas vera ĉerko, en kiun oni enmetas la malliberulojn.

*Persekutado de Maldekstraj komunistoj.*

Ne malpli ol la menŝevikoj, ol la soc. rev., la anarkiistoj kaj aliaj politikaj kontraŭuloj estas persekutataj tiuj *membroj de la komunista partio* de Rusiando, kiuj postulas pli da demokratecon en la partio. Tiuj kuniĝis je tiel nomata "laboristgrupo", kiu defendas la rajton de la proletarioj je memdecideco en ekonomio kaj politiko, kaj kelkajn aliajn simplajn membrojn, kiuj riskis opozi kontraŭ la oficiala politiko de la reganta triumvirato (Sinovjef, Kamenef, Stalin). Antaŭ ne longe la laboristgrupo estis organizinta protestkunvenon kontraŭ la persekutoj de la maldektraj komunistoj.

Okazis pluraj arestigoj de partoprenantoj kaj de senpartianaj simpatiantaj laboristoj. Parto de la arestitaj laboristkomunistoj estis nokte transportata per ekstra vagonaro en ekzilon, en la nordajn arbarojn (Ĉardina regiono). Samtempe estis translokata parto de la Kreml-a ruĝarmea bataljono, kiu deklaris solidarecon kun la grupo de la laboristkomunistoj, al la gubernio Smolensk. Inter la persekutataj maldekstraj komunistoj troviĝas kelkaj eminentaj membroj de la partio: N. Kusnezoff, G. Mjasnikoff, kaj A. Medwedjeff.

*N. Kusnezoff*, unu el la gvidantoj de la laboristgrupo, jam pli ol unu jaron estas en siberia malliberejo. Dum ĉi tempo li trifoje manĝostrikis, foje 13, alifoje 15 tagojn. Estas raportite ke oni provadas devigi lin subskribi iujn dokumentojn favorajn por registaro kaj Ĉeka, sed li rifuzas subskribon.

*A. Medvedjeff*, estas tre populara ĉe la laboristoj, kiu fakto sola jam elvokis malŝaton de la centra komitato kontraŭ li. Kelkfoje jam estis arestita, kaj fine eksigita el la partio pro "tro demokrata inklino". Ĉiokaze la gvidistoj komunistaj provoke rekomendis al Medvedjeff pafi kuglon en sian kapon. Li respondis, ke ĉi konsilo estus akceptita de li en la jaroj 1918/19, sed nun en jaro 1924 li estas sciinta tiom da dolorigaj sekretoj pri komintern kaj ĝia putra sistemo, ke lia klaskonscio pro la fakto de eksigo el la partio ne povas esti skuata. La lastaj sciigoj pri Medvedjef komunikas, ke li estas akre spionata, kaj ke estas intencate ekzili lin al la marĉaj nordarbaroj aŭ al Siberio.

*G. Mjasnikoff* estas konata malnova revoluciulo, kiu multe suferadis sub carismo. Li estas unu el la plej malnovaj membroj de la komunista partio, kiu antaŭe estis tre proksima al Sinovjef, Krestinski kaj aliaj gvidistoj. Sed lia agado en la Laboristgrupo vekis la venĝemon kontraŭ li en la gvidularo reganta. Ni citas ĉi tie el lia lasta letero, kiu venis de li el la malliberejo en Tomsk.

"Post kiam mi en Moskva arestejo estis dudek tagojn, mi komencis manĝostrikon por atingi plenumon de jenaj postuloj: 1. ke estu komencota proceso, ĉe kiu estu certigata al mi rajto de defendo en plenpubliko, 2. aŭ mian liberigon . . . Post kiam la komencita lan de Juno 1924 malsatstriko estis daŭrinta jam 10 tagojn, venis G. P. U. (Ĉeka)-komisaro, por minaci al mi perfortan nutradon, je la okazo, ke mi ne finus manĝostriki. Ĉiu, kiu ne forgesis la revolucian tradicion de la estinto, konas la malamon de la revoluciuloj kontraŭ ĉi malnobla rimedo, kiu celas fini la manĝoskrikon perforte. Eĉ la carismo ĉi rimedon nur uzis en la plej maloftaj okazoj."

"Pravda" antaŭ ne longe nomis la uzatan en polaj malliberejoj perfortan nutradon "barbara ordinaraĉa rimedo". Ĉi tio valoras por la batalmetodoj de la pola burĝaro; en Tomsk tio ne estas malnobleco, sed plej alta floro de la porletara komunista kulturo!! . . .

Ĉar mi spite al dufoja uzo de perforto daŭrigis la manĝostrikon, la malliberеja administracio kaj la G. P. U., fako Tomsk, agis en maniero, kiu superas la barbarecon de la pola fijusteco kaj donas tre valoran instruon al la faŝistoj de la tuta mondo. 13an tagon, nokte de la dua horo, ili eniris mian ĉelon, en kiu mi jam kuŝis senmove; ekkonante mian intencon, neniel fini mian manĝostrikon ili prenis min kaj trenis en frenezulejon.

Fakte, ĉi taktiko estas pli kompleta ol tiu de la polaj faŝistoj. Tiuj ankoraŭ ne estas tiel progresintaj. Sed ĉi estas konstatate: protestanto estas frenezulo kaj decas, ke frenezulejo estu lia loko. Precipe, se li arpartenas al la laboristklaso kaj estas komunisto depost 20 jaroj. Oni devas konfesi, ke la faŝistoj ne tiom progresis, ili ne estas jam maturaj por tia "proletaria etiko".

Estas klare, ke oni per ĉi procedo intencas forigi min, politikan opoziciulon, oni transportis min al Tomsk, por fari tian manipulon kaŝe. Wasloff, la prezidanto en loka juĝejo persone al mi diris: "Se ni volus obei la leĝojn, ni devus liberigi vin; via aresto estas kontraŭleĝa" kaj alia repezentanto el ŝtata akuzistaro, Mestscherjakov diris: "Revoku, esprimu vian penton. De vi mem dependas rericevi liberon. "Tiamaniee iĝas torturo ĉi tie la traktado al mi kaj mia familio, ĉar oni volas ricevi de mi ĉi rimede revokon.

Absolute ne mi faris krimon. Nur tial mi estas arestita, ĉar mi kredis la "honorparoloj" de Krestinski (bolŝevika ambasadoro en Berlin) kaj de Sinojew (kaj pro la sama kaŭzo mi revenis el eksterlando Rusion). Kaj al Tomsk, mi nur venis, ĉar mi kredis la "honorparolon" de Menjinski, Deribas, Ag-

**La movado bezonas *vian* agokapablon.**

ranov kaj Slovatinski. Kompreneble ankaŭ tial, ĉar oni kredis, povi venki min ĉi tie pli facile. Kamaradoj, mi estas preta penti. Mi konfesas je mia proletaria honoro, ke neniam denove mi fidos al la trompistoj Sinovjev, Krestinski, Menjinski!

Konsidere mian proletarian estintecon, devenon kaj meritojn, estu konstatate, ke mi estas traktata pli severe ol ĉiuj kontraŭrevoluciuloj kaj ordinarkrimuloj de Tomska malliberejo. Ĉiu devas ne paroli kun mi, malliberuloj, gardistoj kaj vartistoj. Ĉiuj kontraŭrevoluciuloj rajtas havi interligon kun ekstero, al mi ne estas permesate. Mia edzino kaj tri infanoj (la plej aĝa havas 4 jarojn), troviĝas en administra ekzilo. Ŝia krimo estas pli grava ol la mia: Ŝi estas mia edzino. Kaj la infanetoj estas ekzilitaj, ĉar ili estas miaj infanoj."

Depost ĉi tiuj sciigoj Mjasnikow, liaj edzino kaj infanoj kvazaŭ malaperis Ŝir-a malliberejo. Ĉiuj interrilatoj kun liaj parencoj kaj amikoj rompiĝis.

*El nia Leteraro.*

I.

Al Unuigita Komitato por la helpo al enkarcerigitaj revoluciuloj en Ruslando.

Karaj kamaradoj!

Mi rapidas komuniki al vi la malĝojigan novaĵon, pri la arestigo de mia edzo Konstantin Govar, membro de Tutrusia Anarkiista Federacio. Okazis 16an de Oktobro 1924. Lia krimo estas, ke li ŝajnas laŭ la opinio de la bolŝevika potenculaŭro "socialdanĝera elemento". Verŝajne li estos ekzilata aŭ metata en severan izolecon. Mia edzo estis korespondanto de anarkiistaj revuoj "Amerika Isvestija", "Golos Truda" kaj aliaj. Li estis arestita je ordono de Ĉeka de la okcidentaj regionoj. Ĉe domtraserĉo estis konfiskataj pluraj anarkiistaj revuoj kaj manuskriptoj. Nuntempe mia edzo estas enkarcerigata en malliberejo de Mosyr. Pli poste mi informos vin pri la cetero.

Kun frataj salutoj
Ljubowj Govar.

II.

Karaj kamaradoj, vian leteron mi ricevis. Mia edzo troviĝas nuntempe en la interna malliberejo de la Ĉeka en Blankrusio. Ĉe sama okazo estis ares titaj ankoraŭ 20 aliaj anarkiistoj en la okcidenta regiono, kaj ili estas tenataj kun mia edzo. Inter la arestitoj troviĝas M. Sedneff (Laboristo), N. Tscherefôk (oficisto), I. Bobr kaj A. Zitzkevitsch (kamparanoj), P. Jurtschenko (laboristo), Zichtenko, Geroff, Baljunkevitsch (laboristoj), Rodkevitsch (studento). Pri la aliaj estonte.

Minsk, 10. 12. 1924. Ljubowj Govar.

III.

Karaj kamaradoj, unue mi devas sciigi al vi, ke Ljubovj Govar estas arestita, kaj nuntempe troviĝas en urba malliberejo de Minsk, kie estas ŝia edzo. La monon, kiun vi sendis al ŝia adreso, mi ricevis laŭ ŝia deziro. Ilia sano? Kian sanon oni povus havi en malliberejo?

14an de Januaro 1925. (Subskribo.)

Delegitaro eksterlanda de la partio de maldekstraj socialrevoluciuloj kaj de la maksimalista unio.

J. Steinberg.

Reprezentanto de la Moskva Komitato por la helpo al la Anarkiistoj.

Aleksandro Berkmann.

Sekretario de la Unuigita Komitato.

M. Mratschny.

## NOVAJ SCIIGOJ EL RUSLANDO.

(Liveritaj speciale por L. L. flanke de Unuigita Komitato [membro de TLES].)

*Nelegala revolucia agado.* Arestita k-do. Lacareviĉ gvidis nelegalan laboristogrupon, kies celo estis la fondo de sendependa Laborist-Unio. Ĉiuj membroj de la grupo laboris permane. K-do. Lacareviĉ funkciis en 1920—21 jaroj kiel interpretanto ĉe kom. intern. Lasttempe li estis okupata ĉe "Russkabel" kiel muntisto. Laborista grupo publikigis el subtere tri proklamaĵojn. Lacareviĉ estas kondamnita al tri jaroj da koncentrotendaro, sed ankoraŭ li estas tenata en fifama Butzki-malliberejo (Moskvo).

*Arestigoj amasaj de anarkiistoj.* En monatoj aprilo, majo de ĉi jaro en Moskvo kaj Leningrado okazis amasarestigoj en anarkiistoj vicoj. Ĉirkaŭ 80 kdoj Laboristjunuloj, laboristoj kaj maristoj jam estas arestitaj kaj plejparte ekzilitaj jam al Siberio. Inter aliaj k-doj ankaŭ k-do *Sergej Hajdovski* kaj lia edzino Aleksejeva. H. fervore agis kiel laboristesperantisto kaj dum jaroj kunlaboranto de Esperantorevuo "La Nova Epoko" ŝanĝita (Senn. Rev.). Ĉeka konfiskis ĉe k-do Hajdovski plurajn manuskriptojn. Li kaj lia edzino estas kondamnitaj al trijara ekzilo.

Studento *Golubief* ankaŭ al trijara ekzilo estas kondamnita pro partopreno je grupo por memklerigado.

Studento *Bajanof* antaŭ 4 jaroj simpatiis al anarkiismo, sed neniam li agis iel por ĝi. Tamen li estas ekzilita 4 jarojn.

L'anarkiistoj *Moĉenovski* kaj *Nei* troviĝas jam plurajn jarojn en Ĉeka karceroj je tre severaj kondiĉoj.

Post dujara ekzilo en Ust-Sisolsko la anarkiistino *Donskaja* denove estas kondamnita al "Sen 30" tio signifas: ekzilo ekster la plej gravaj 30 rusaj ĉefaj urboj. Ŝia fratino, senpartiulino, estis arestata 23an de marto kaj ekzilita al Ural-regiono.

Anarkiisto *Klimuŝev* estas kondamnita (16. 4. 1925) je 5 jaroj da koncentro-malliberejo.

La plimultaj el la nun arestitaj 80 anarkiistoj troviĝas nun en Moskva Butirkimalliberejo, kie la reĝimo estas tre severa. Konstante ĉirkaŭ 10 % el la politikaj arestitoj manĝostrikas. Specialkruele oni traktas la manĝostrikantojn: Nek vizitoj, nek banoj, promenoj sur la malliberejа korto estas permesataj al ili. Eĉ simpla iro al necesejo estas malpermesata. Pro la plej eta protesto ili estas izolataj en pun-ĉelo, ofte ili estas batataj.

Malliberigito en Butirki-malliberejo ricevas nur pajlosakon kaj estas divigata dormi ofte sur la malvarma kaj malpura planko. Tia "ordo" ekzistas en bolŝevika "modelmalliberejo". Eĉ pli malbona kaj nepriskribebla do estas la situacio en provincaj lokoj.

Kamaradoj! Laboristoj! Kruela estas la situacio en la bolŝevikaj karceroj. *Eĉ pli malbona* estas la situacio de la ekzilitoj. Kiel konate la nuna metodo de la Ĉe-Ka estas ekzili la ekskarcerigitojn post absolvo de karcera puno. Trovi laboron ne estas eble, Ĉe-Ka ja malpermeras okupi la ekzilitojn kiel laboristojn aŭ oficistojn. La registaro al ekzilitoj nur donas 6 rublojn po monato. Malsato, malvarmeco, senloĝeco kaj diversspecaj fimalhelpoj de la lokaj Ĉe-Kaoficoj — jen la sorto de la liberigitaj el karcero k-doj.

## Tuja helpo necesas!

Sendu monrimedojn al la Unuigita komitato por la helpo al la enkarcerigitaj revoluciuloj en Ruslando al adreso: F. Kater (Ver. Komitee), Berlin O 34, Kopernikusstr. 25, II.

Komisiite
M. Mraĉni, sekretario.

## Protesto.

La anarkiistaj SAT-anoj informitaj pri la arestigo de ilia kamarado. *S. Hajdovski SAT-ano 1632, aktiva kunlaboranto de "Sennacieca Revuo"* (antaŭe "La Nova Epoko") kaj de lia edzino *Nina Aleksejeva* (SAT-anino 1362) energie protestas antaŭ la rusa registaro kaj postulas la tujan liberigon de iliaj sindonemaj geamikoj.

## Vivu la milito.

*De Bruno Vogel.*

### La reformacio.

Iu skribis al mi sekvantan leteron el militejo:

Karulo!

Mi scias, ke vi pasias pri unikaj travivaĵoj. Tial mi volas rakonti al vi la historion de la reformacio.

Sepfoje dum ĉi ambaŭ noktoj divisionaj ordonoj vipis la regimenton al atako.

Sepfoje l'atako rompiĝis en bombardo de la malamiko.

La 14an de novembro la regimento estis veninta en la plej antaŭan linion. 3a bataljono havis 394 virojn.

7an de decembro, vespere je la 9a la regimento atakis je unua fojo. 3a bataljono havis 283 virojn.

Matene je la 5a kaj duono estis disbatita la kvina atako de ĉi nokto. La 3a bataljono nombris 191 virojn.

Malrapide la tago pasadis, senfine malrapide.

Dum vespera krepusko la "milicano" Pöneck el la dekunua kompanio mortis.

La vunditoportantoj ne povis lin transporti al malantaŭo, ĉar, se oni lin tuŝetis, eĉ karese nur, li ekkriis pro frenezeca doloro, kvazaŭ porko mortpikata.

Tial oni lasis kuŝi lin en la truo, kaj li ne havis dolorojn.

Sub lia kapo dum pasado de l'horoj sangobulo kreskis.

Li rakontis:

"Estis tiutempe apud Verdun.

Ree kaj refoje ili incitegis nin kuri en ĉi infernon.

Ree kaj refoje.

La homoj estis ankoraŭ nur kvazaŭ muta senespera plorajo.

Ĉiufoje ĉe sunleviĝo estis denove oferitaj, multaj, multaj miloj.

Tute sen utilo.

Je iu mateno staris antaŭ nia tranĉeo granda kruco, al kiu estis najlita la kadavro de germana soldato.

Dum unu tuta tago voksignis la krucifikso apud Verdun.

Inter sango kaj suna lumo.

Neniu, kiu ĝin vidis, forgesos ĝin.

Dum la nokto ni devis faligi ĝin per mangrenadoj.

Ili neniam eksciis, kiu el la kamaradoj estis la farinto."

Tiam dum minutoj silentis milicano Pöneck. Kaj li komencis denove: "Estis tiutempe apud Verdun. Ree kaj refoje —."

Ĝis li mortis dum vespera krepusko.

Divisiona ordono estis legata dum nokto: . . . Malkuraĝon kaj devoforgesemon mi ne indulgas! La regimento atakos je la 9a kaj 40 minutoj! La malamika pozicio devas esti prenota!

La regimentestro diris: "La divisionestro ŝajnas ne plu povi majstri sian apetiton al 'Por la merito'."*)

Je 11a kaj duono ni atakis pluan fojon.

Iĝis tre terure, sed estis pasinta jam 10 minutojn antaŭ noktmezo.

Ĵus antaŭ fino de la nokto revenis la regiment- kaj bataljonestroj revenis de la divisionestro.

Dum la tago de mano al mano tra l'tuta bataljono rondiris revuo. Estis ankoraŭ nur 23 viroj.

Kelkaj linioj en ĝi estis signitaj per ruĝkrajono. Ĉe la rando estis skribite:

"Ĉi citajon dum lasta nokto en la divisionestra ŝirmloĝejo la divisiona pastro tradukis al tri francaj virinoj. Ili ĉiuj kune trinkis vinon kaj likvorojn, kaj la francaj virinoj ĝojkriis: "vivu la milito." La divisionestro kaj lia stabo ridegis. Je mia peto la divisiona pastro donacis al mi ĉi kajeron. — Mia bataljono atakis dum ĉi tiu nokto dufoje kun teruraj perdoj.

N. N., Kapitano, bataljonestro."

La signitaj linioj:

"La ĝemadon kaj ploradon pri la doloro kaj mizero de la milito mi jam de longe ne plu ŝatas. La milito ne estas malfeliĉo por Germanio, sed feliĉo por ĝi. Dankon al Dio, ke ni havas la militon: ĝi sola nur povas savi nian popolon, se tio ankoraŭ eblas, kion mi konvinke esperas. Ĝi estas la granda operacitranĉilo, per kiu la granda kuracisto de la popoloj fortranĉas la terurajn venenigantajn ĉion pusoŝvelajojn. Kaj, dankon al Dio, ke ni ankoraŭ ne havas pacon. La vundoj tro baldaŭ refermiĝus, kaj la malbono estus pli granda ol antaŭe."

Ĉi tion estis verkinta pastro por la ortodoksa eklezia semajnajo "La Reformacio".

"La Reformacio", rondiris de mano al mano tra la tuta bataljono. Estis ankoraŭ 23 viroj.

*) Plej alta milita ordeno.

Vespere la regimento estis prenitaj el la tranĉeo; 19 vira la 3a bataljono iris al pozicio porripoza.

Ĉe la divisionestra ŝirma loĝejo okazis halto. La bataljonestro iris malsupren por raportanonci.

Gardestaranto staris ĉe la finajo de la longa forna fumtubo, tra kiu la kampforneto sendis molan varmon, miksitan kun fragmentoj de valso ludata de gramofono.

La gardestaranto diris: 46 ŝtupojn je profundo estas ĉi subtere. Neniu projektilo povas trabori sin. Vinon kaj brandon ili malsupre havas kaj inaĉojn francajn.

Eĉ ili urinas kaj kotas malsupre, kaj la soldatservistoj devas tion porti al supre.

Kaj ni, kompare — — —"

Iu el la bataljono diris:

"Malkuraĝon kaj devoforgesemon mi ne indulgas!"

La kapitano revenis: "Hodiaŭ ili havas malsupre kvar inaĉojn."

Unu voĉo: "La milito estas la granda operacitranĉilo. Pusoŝvelaĵojn fortranĉu!"

Alia voĉo: "Ili neniam eksciis, kiu el la kamaradoj estis la farinto."

Kvazaŭ mokridante faladis la ovoformaj mangrenadoj de l'3a bataljono tra la fornotubo malsupren. Komence oni ankoraŭ aŭdis kelkajn akrajn kriojn, kaj la gramofono kantis: "Tion, ja, la knabinoj tre ŝatas —." Fine nur ekzistis la malhela murmurego de la venĝaj eksplodoj. Inter ŝultraj ranginsignoj, koitulina karno kaj alkoholo, je 46 ŝtupoj profunde sub la tero.

Maldolĉkolero ĝojegis: "Reformacia festo!"

Cetere: oni kredis pri spontanea eksplodo de mangrenadoj jetbastonaj. Ili neniam eksciis, kiuj el la kamaradoj estis la farintoj.

Trad. Haĉjo.

# Metamorfozo.

Malamo, venĝo, malsato, kripluloj, blinduloj, fratmortigo, torturoj . . . ĉio ĉi-tio estas la masko de l'paco surtera!

*Grandega pundomo — la mondo!*

Ĝiaj gardistoj: ŝtatoj, eklezioj, leĝoj soldataro. Ili febre pretigas novajn mortigilojn; dume la homaro kriante postulas panon . . . rifuĝejon; la patrino priploras sian filon . . . la infanoj sian patron . . . la knabino sian kunulon!

*10 milionojn da homoj*

la sangsoifa imperialismo dispecigis. — El ilia ostaro elkresku la venĝontoj . . . kaj la ciklono bruege traveturos la landojn; pereigos ĉion ŝiman kaj putriĝintan, ĉion velkantan; forbruligos la parazitojn, kreos al la pureco aeron.

Alportos:

lumon, vivon, amon,
pacon, ĝojon, liberecon,
al la popoloj, al la homaro!

En ĉi signo venko.

El: "Freie Menschen", Nr. 1. Trad.: L. Heinrichs, M.-Gladbach.

# Ve al afero . . .

Kaj mi vidis malliberejon levi ĉielen siajn mallumajn murojn. Kaj ti-kiuj preteriris, alstrabis ĝin kaj diris: "Ĝi estas la loĝejo de l' peko."

Al ili estis malfermita la vasta ĉielo kaj la tuta tero; ili vidis printempajn burĝonojn; ili aŭdis la birdojn, kiuj revenis el la sudaj landoj; ili sentis la sunon, kiu denove varmigis la korojn de ĉiuj bestoj kaj plantoj.

**Varbu abonantojn por „Libera Laboristo".**

Sed el la malliberejo kaj el malantaŭ de ĝiaj malvarmaj dikaj muroj kaj malgrandaj rondaj, trioble kradigitaj fenestroj aspektaj kiel ŝaktoj — — ĝemoj kaj vekrioj penetris aeren . . . Kaj ilis diris: "Tio estas justeco! . . . Ĝi do estas la loĝejo de l'peko."

Sed mi aŭdis voĉon: "Ve al tiu afero, kies vojo ne iris tra malliberejo!"

Kaj mi supren rigardis! Kaj en la malliberejo mi vidis la ĉiuepokajn savintojn, kiuj savis kaj liberigis la mondon . . . Ĉe iliaj manoj kaj piedoj estis sangaj vundoj. — Kaj en la domo de l' sklaveco mi vidis izraelon antaŭ ol ĝi ekstaris alporti al la homaro sian parton.

Ve al tiu afero, kies vojo ne iris tra malliberejo!

Kaj en la malliberejo mi vidis tiujn, kiuj donis al la sklavo liberecon; kiuj liberigis la homspiriton kaj ĝin kondukis supren al libereco, justeco kaj amo.

Ve al tiu afero, kies vojo ne iris tra malliberejo!

Kaj interne la gastoj supren etendis la brakojn. Ĉe la artikoj estis signoj de ĉenoj. Sed mi kaŝis miajn manojn; ĉe ili estis nenia cikatro.

Ve al tiu afero, kies vojo ne iris tra malliberejo! . . .

Verkis: Ernest Crosby. Trad: L. Heinrichs, M.-Gladbach.

# Tutmonda Ligo de Esperantistaj Senŝtatanoj.

Adreso: J. M. Esperanto, 9 rue Louis Blanc, Paris X.

Oficialaj informoj.

## Provizora statuto de T. L. E. S.

Ie. Estas fondita sub la titolo "Tutmonda Ligo de Esperantistaj Senŝtatanoj" (T. L. E. S.) esperanta unuiĝo celanta: 1e Servi per dokumentizo (raportoj, artikoloj, libroj, broŝuroj, revuoj ktp.) ĉiujn anarkiistajn aŭ proksimaj al anarkiistaj laŭ sia taktiko organizaĵojn. — 2e Disvastigi anarkiismon per enpreso de prianarkiismaj artikoloj en esp. laboristaj gazetoj.

IIe. Servi kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamlingvaj anarkiistaj aŭ similaj organizaĵoj.

IIIe. La membreco dividiĝas dufake: aktiva membro, subtenanta membro. Povas esti aktiva membro de TLES ĉiu liberecano scipovanta esperanton, kiu akceptas deviĝon laŭpove kunlabori al la tradukado, perado ĉe la interrilatoj kaj al la aliaj servoj postulantaj la uzadon de esperanto. Povas esti subtenanta membro ĉiu liberecano aŭ liberecana organizaĵo esperantista aŭ ne, kiu deziras subteni per monhelpo (aŭ alimaniere) la ligon. Ĉiu subtenanta membro rajtas ĝui la servojn de la ligo, sed ne rajtas partopreni ian decidon de la ligo, nek eniĝi ian ligan organon.

IVe. Kotizo estas laŭvola.

Ve. La organoj de la Ligo estas: Interlanda Sekretario, Enlanda Sekretario kaj la Presorgano. Ĉiuj enlandaj sekcioj estas tute memstaraj en sia interna organizado. Interlanda Sekretario estas elektata per referendumo.

VIe. La Ligo agas nur laŭ principo de solidareco kaj reciprokeco. Ju pli oni faras por la ligo des pli oni ricevas. Ju pli da solidaecro des pli da rezultoj. Ĉies devo estu tia, ke ĉiu trovu en alia ano la plej bonan peranton por informo, enketo, ktp.

VIIe. Estas eksigata el la ligo ĉiuj membroj kiuj intence agis kontraŭ la celoj, principoj kaj interesoj de la ligo aŭ malbonuzis ta konfidon de aliaj membroj. Ĉiu membro ne plenuminta la prenitan sur sin promes-deviĝon eksiĝas el la ligo aŭtomate.

VIIIe. Se estas eble ĉiujare okazas kongreso de la ligo. La lokon, daton kaj kondiĉojn fiksas la interlanda sekretario.

# Enketo pri dusemajna folio.

*Karaj amikoj.* Nia movado bezonas ne nur dikan revuon, sed ankaŭ ofte aperantn informfolion. Tial ni petas respondi la jenajn demandojn:

1e Ĉu vi estas preta alsendi ĉiudusemajne al la kreota folio malgrandajn koncizajn raportojn pri la plej gravaj okazantaĵoj el la laborista kaj revolucia vivo en via lando?

2e Ĉu vi estas preta konstante traduki la folion (supozita 4 paĝan) por vialandaj liberecanaj organoj?

3e Kiaj organoj en via lando favore rilatas al espo. k presigos la tradukitan de vi materialon?

4e Kiuj el tiuj organoj estas pretaj liveri al vi la tradukindan informmaterialon?

5e Ĉu vi estas preta helpi finance al la kreo de ĉi folio, se jes kiom vi pretas doni kaj kiamaniere?

Respondo plej eble detale. Ĉi enketo estas destinata por bone pristudi la aferon antaŭ ol ion decidi. Nur en okazo de plena efektivigibleco ni entreprenos la aperigon.

Bonvolu respondi tuj al la Eld. Kom. Ĉu vi abonus 4 paĝan informbultenon aperantan ĉmdusemajne k donanta en konciza formo bildon pri la liberecana movado tutmonda?

La respondo estas urĝe bezonata por scii la financon bazon de l'kreota informbulteno. Jam nun sendu al ni aktualajn informojn pri laborista movado, kaj ni povos konstati, ĉu L'Informilo prosperos. Nepre ni uzos la materialon, se ne en regula presita Informilo, do en multobligita Sciigilo. Eld. Kom.

*Karaj legantoj!* Kvankam ni uzas nur malgrandajn presliterojn la spaco ne sufiĉas por presigi ĉion. Pro tio multa materialo (jam kompostita) devas resti ĝis 2a nro. Bedaurinde ni ne povis aperigi novajn sciigojn pri kruelaĵoj de l'bolŝevikoj kontraŭ revoluciuloj, kiuj atingis nin ĵus, kiam ni komencas la presadon. En nro. 2 estos publikigata detala raporto pri financa kaj morala stato de TLES. Eld. Kom.

Libera Laboristo aperas dumonate. Manuskriptojn sendu al J. M. Esperanto, Paris. nur aktualaj raportoj pri la liberecana movado povas esti sendataj senpere al Eld. Kom., Berlin. Neuzataj manuskriptoj ne estas resendataj. Represo estas dezirata, se oni citas la nomon de nia organo kaj sendas du ekz. de la represaĵo al Red.

*Jarabono:* Argentino 3 pes.; Aŭstrio 65 000 kr.; Belgio 20 fr.; Brazilo 7 milr.; Britio 5 ŝil.; Bulgario 120 lev.; Ĉekoslovakio 32 kr. ĉ.; Danio 5 kr. d.; Estonio 350 m.; Finnlando 40 m.; Francio 20 fr.; Germanio 4.20 rm.; Hispanio 7 peset.; Hungario 5 kr. or.; Italio 20 lir.; Japanio 2.50 jen.; Jugoslavio 70 din.; Litovio 9 lid.; Nederlando 3 guld.; Norvegio 8 kr. norv.; Polio 4 zlot.; Portugalio 22 esk.; Rumanio 200 lej.; Rusio 2 rubl. or.; Svedio 4 kr. sved.; Svisio 5 fr.; Usono 1.50 dol. — Abonebla ankaŭ ½ jare. Ponumera prezo ⅕ de la jarabono. — Sendu *nur* nedifektajn monbiletojn al Arthur Bolle, Berlin N 58, Tresckowstr. 58. Poŝtĉ.-kto. (nur por Germanianoj) Berlin 402 66.

Presejo: C. Janiszewski, Berlin SO 26. Elisabethufer 28/29.